

EL POPOLA

ĈINIO

中國報道

10 1983



Virinoj de Dali estas tre lertaj en brodado. En la foto vi vidas bele broditajn tukojn, per kiuj la patrinoj portas siajn infanojn sur la dorso.



Dali, antikva kultura urbo de Ĉinio

Fotoj de LAO BAI


Dali situas en la mezo de la Baj-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de Yunnan. Ĝi sidas antaŭ la monto Cangshan kaj rigardas al la lago Erhai. Tie estas multaj pitoreskejoj kaj antikvaj konstruaĵoj.

En la 8-a kaj 9-a jarcentoj Dali servis kiel la ĉefurbo de Nanzhao-regno en Tang-dinastio kaj kiel tiu de Dali-regno en Song-dinastio kaj fariĝis grava pasejo por kultura interfluo kaj komerco inter Ĉinio kaj landoj de sudorienta Azio. Nun en Dali oni povas vidi la ruinon de la tiama urbomuro, la Tri Pagodojn de Chongsheng-templo kaj la steleon Dehua de Tang-dinastio.





La Tri Pagodoj de Chongsheng-templo estis konstruitaj en la 9-a jarcento. La granda pagodo 16-etaĝa altas 69.13 metrojn kaj la du malgrandaj dek-etaĝaj 42.19 metrojn.



Templo sur Shizhong-monto




Jen la Papilia Fonto. Ĝia akvo ŝprucas el ŝtonfendo kaj ĉirkaŭe dense kreskas arboj kaj floroj, inter kiuj distriĝas papilioj. Ĉirkaŭ la 15-a de aprilo sennombraj papilioj mirakle kolektiĝas ĉe la fonto.

La steleo Dehua estas restaĵo de Nanzhao-regno en la 8-a jarcento. La steleo kun alteco de 3.02 metroj kaj larĝeco de 2.27 metroj surhavas pli ol 3 800 ĉinajn ideogramojn, kiuj registris la rilatojn inter Nanzhao kaj Tang-dinastio.

Sur strato de Dali





Loğdomo en Dali

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Sani-a knabino

Foto de REN SHIYIN

SUR LA DORSKOVRILO:

Botelo kun inkrustaĵoj

Foto de REN SHIYIN

Oni lakas la ŝelon de objekto, poluras la surfacon kaj enigis orajn kaj arĝentajn fadenojn, perlamo-tojn, koralojn k.a. por formi diversajn belajn desegnaĵojn.

KOLORAJ SERIOJ:

Dali, antikva kultura urbo de Ĉinio

Cangshan-monto kaj Erhai-lago

Fotoj faritaj de esp-istoj

Vojaĝo laŭ Songhua-rivero (1)

Antikvaj freskoj de Yunnan

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Nova fizionomio de la irigacia sistemo de Jiangsu

Somera kampado de komunika scienco kaj tekniko

Enhavo

Norden fluu akvo de Jangzi-rivero	2
Vizito al la antaŭa "Koridoro de Inundo"	5
Kaŭĉukarboj sukcese kulturataj en la regionoj inter 18°-24° N	11
La ĉina poŝta kaj telekomunika afero	8
Vojaĝo laŭ Songhua-rivero (1): Vojaĝo laŭ la Dua Songhua-rivero	50
Nelacigebla fervorulo	17
Esperanto devas esti uzata en sciencoj kaj ĉiutaga vivo	19
SUR NIA LIBROBRETO: Memoru la militon	15
POR KOMENCANTOJ: Forflugu, nia birdeto!	16
ESP-NOVAĴOJ	13
La unua doktorino kulturita de Ĉinio mem	21
Komputero kaj la ĉina medicino	27
La ĉina antikva filozofio (1)	28
Post la laboro	34
MIA VIVO: Mi amas esti manekeno	41
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Antikvaj freskoj de naciminoritatoj en Yunnan	38
INTER NI	48
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Ĉina tradicia kalendaro	37
5 000 JAROJ DE ĈINIO: La politiko de Tang-dinastio en la komencaj jaroj	43
HISTORIAJ URBOJ: Dali — Antikva urbo sur altebenajo	24
Bulgara profesoro Gan Yangdao refoje en Ĉinio	46
KURANTAJ AFEROJ	32
KORESPONDI DEZIRAS	49
Forgesemulo	48

JARABONTARIFO	Belgio	BF	180.00	Finnlando	FMK	24.00	Italio	Lit	5200	Nederlando	Gld.	12.60	Portugalia	Esc.	400		
Aŭstralio	SA	5.70	FR Germanio	DM	10.80	Francio	FF	26.00	Japanio	Yen	1400	Nov-Zelando	NZ\$	6.70	Usono	US\$	6.00
Aŭstrio	Sch	80.00	Britio	£	3.00	Hispanio	Pts	600	Jugoslavio	Din.	180	Svisio	SF	10.00	Kanado	Can\$	7.20

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 2.20 US\$ 4.30

Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 3.00 US\$ 6.00



LI BONING*:

Norden fluu akvo de Jangzi-rivero

JANGZI-RIVERO de antikve torentas orienten, kaj fluas en la Orientan Ĉinan Maron. Sed post nelonge, parto de ĝia akvo sin turnos al la soifanta norda Ĉinio laŭ la homa volo. Jen projekto longe pripensita en Ĉinio. Ĝi trapasos basenojn de kelkaj riveroj, kaj suda akvo kondukigos norden.

La akva rezervokvanto de Ĉinio estas ĉ. 2 700 miliardoj da kubmetroj, okupante la sesan lokon en la mondo. Tamen la rezervokvanto de akvo en diversaj lokoj de Ĉinio estas ne egala. La kvanto de precipitaĵo pli kaj pli malgrandiĝas ŝtupare de la apudmaraj regionoj sudorientaj al la internaj regionoj nordokcidentaj. Estas grandega malegaleco inter la atmosferaj precipitaĵoj en la apudmara regiono kaj la landinterno, la sudo kaj nordo. La plej alta meznombra jara atmosfera precipitaĵo atingas 6 558 mm, dum la plej malalta estas nur 6.3 mm. Sur la tutlanda mapo pri atmosfera precipitaĵo, oni vidas diagonalon de sudokcidento al nordoriento, kiu markas la egalkvantan pluvon de

400 mm. 45 % de nia tero estas sekaj kaj duonsekaj regionoj, kie la jara kvanto de precipitaĵo restas sub 400 mm. Tial ege diferencas la flukvantoj de la sudaj kaj nordaj riveroj. Prenu ekzemple la du plej grandajn riverojn de nia lando. Jangzi-rivero estas pli longa ol la Flava Rivero nur je 800 km, sed ĝia jara flukvanto estas 960 miliardoj da kubmetroj, dum tiu de la Flava Rivero estas nur 68.6 miliardoj da kubmetroj. La flukvanto de Jangzi kaj la riveroj sude de ĝi konsistigas 82 % de tiuj de riveroj de la tuta lando, dume la areo de agraroj de tiuj basenoj konsistigas nur 38 % de tiu de la lando. Kontraste al tio, la flukvanto de la riveroj Huaihe kaj Haihe kaj la Flava Rivero konsistigas nur 6.6 % de tiu de la tuta lando, sed la areo de agraroj de iliaj basenoj konsistigas 40 % de tiuj de la lando. Cetere en la nordo pluvo plejparte falas en somero kaj aŭtuno kaj 70-80 % el la pluvokvanto falas junio, julio, aŭgusto kaj septembro. Ege diferencas la pluvokvantoj en malsamaj

jaroj. En pluvoriĉa jaro ofte falas pluvo eĉ 3-6-oble pli multe ol en seka jaro. Tie sekeco daŭras ofte 2-3, eĉ 5-10 jarojn. Kaj plie koncentriĝo de pluvo en mallonga tempo ofte kaŭzas inundon, tial en la sudo oni estas de tempo al tempo ĝenata de superakvego, dum la nordanoj deziregas moderigi sekegecon.

Post naskiĝo de la popola respubliko en 1949 la registaro faris grandskalan akvomastromadon konstruadon en la nordo, dank' al kio multe potenciĝis la kontraŭsekeca povo. Tamen la disvolviĝo de la industrio kaj agrikulturo postulas liveradon de pli kaj pli multe da akvo. Fakte la akvo en la nordo ne povas kontentigi la bezonon, kio forte katenis la disvolviĝon de tiea ekonomio. Oni antaŭkalkulis, ke antaŭ la jaro 2000, al la norda Ĉinio mankos 30 miliardoj da kubmetroj da akvo en la ordinara seka jaro.

** La aŭtoro estas vicministro de la Ministerio pri Akvomastromado kaj Hidroelektro. La artikolo estas verkita laŭ nia peto.*

Jen kial estas necese konduki sudan akvon al la nordo.

Jam en la 50-aj jaroj la akvo-mastruma, trafika kaj scienco-esplora departementoj de Ĉinio komencis kontroli la eblecon konduki sudan akvon al la nordo. Grandnombraj specialistoj kaj teknikistoj detale esploris la dekelkajn akvokondukajn liniojn de Jangzi-rivero sur la parto de pli ol 5 000 kilometroj inter Tongtian-rivero en la okcidento kaj Yangzhou en la oriento. En la lastaj dek jaroj ili faris praktikan esploradon kaj

konkretan planadon kaj projektis tri akvokondukajn liniojn okcidentan, mezan kaj orientan.

Laŭ la okcidenta linio oni kondukos akvon el la rivero Tongtian aŭ Jinsha en la supra baseno de Jangzi-rivero al la supra baseno de la Flava Rivero por la sekaj regionoj en la nordokcidenta Ĉinio.


Laŭ la meza linio oni kondukos akvon el la Tri Montgorĝoj de Jangzi-rivero kaj la akvo-konservejo Danjiangkou ĉe Han-rivero al la okcidenta parto de

la ebenaĵo de la riveroj Huaihe kaj Haihe kaj la Flava Rivero per la kanalo konstruota laŭ la montpiedoj de Funiu kaj Taihang en la provincoj Henan kaj Hebei.

Laŭ la orienta linio oni kondukos akvon el Jangzi-rivero proksime al Yangzhou norden laŭ la Granda Kanalo tra la Flava Rivero al la orienta parto de la ebenaĵo de la riveroj Huaihe kaj Haihe kaj la Flava Rivero. La akvo fine atingos la urbon Tianjin.

Jen nia projekto formita dum longaj jaroj. Pro komplika topografio kaj aliaj malfaciloj estas malfacile realigebla en la proksima estonteco la plano pri la okcidenta kaj meza linioj. Kaj nur la konstruo ĉe la orienta linio estas realigebla. Kvankam ĉe la okcidenta kaj meza linioj akvo povos mem flui norden kaj ĉe la orienta linio la akvokonduko bezonas elektron, tamen ĉe la orienta linio troviĝas pli favoraj kondiĉoj: La deirpunkto de la akvo situas ĉe la akvoriĉa malsupra parto de la rivero, kie la fonto de akvo bezonata estas garantiata; la Granda Kanalo povas funkcii kiel akvokonduka vojo kaj la lagoj Hongze, Luoma kaj Nansi apud la akvovojo povas funkcii kiel akvokonservejoj por reguligi la akvokvanton; kaj en la 60-aj jaroj Ĉinio konstruis grandskalan ŝlosilan akvoregulitan pumpstacion Jiangdu proksime de Yangzhou, kiu povos funkcii kiel startpunkto de la linio.

La pumpstacio Jiangdu estas la plej granda pumpstacio en Ĉinio. Ĉiusekunde ĝi povas pumpi 460 kubmetrojn da akvo. Ĝia stariĝo kreis favorajn kondiĉojn por konduki sudan akvon al la nordo kaj en la fakto jam





Zhao Ziyang kaj Qian Zhengying inspektas akvoutiligan konstruaĵon.

markis komencon por la tuta konstruo ĉe la orienta linio. En la pasintaj 19 jaroj ĝi kondukis ĉiujare 4.1 miliardojn da kubmetroj da akvo al Xuzhou, Lianyungang kaj aliaj lokoj, kio unuapaze moderigis la tian akvan mankon kaj alportis rimarkindajn ekonomiajn efikojn. En la estinteco, pro manko de akvo la regionoj Xuzhou kaj Huaiyin havis nur malpli ol 133 000 hektarojn da rizkampoj, sed nun kvinobligis la areo de rizkampoj. El tio ni klare vidas la perspektivon de la tuta afero.

Post plurjara pripensado kaj diskutado pri la orienta linio oni ellaboris planon de kelkaj stadioj. Antaŭ nelonge la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio aprobis la unuaperiodan planon pri la akvokonduko, kiun oni ekplenumos ekde ĉi vintro.

La plano estas jena: oni kondukos akvon de la stacio Jiangdu al la lago Dongping en Shandong-provinco, sude de la Flava Rivero. La trunka linio longas je 650 kilometroj. Ĉar la tero sude de la Flava Rivero pli

kaj pli malaltiĝas de la sudo al la nordo, la riverlito de la Flava Rivero estas pli alta je 40 metroj ol la akvosurfaco de Jangzi-rivero ĉe Yangzhou, tial estas necese konstrui ŝtupare 14 pumpstaciojn survoje por levi akvon kaj konduki ĝin norden. La totala kapacito de tiuj pumpstacioj estos 380 000 kilovattoj. Krom la nun funkciantaj stacioj oni devas konstrui ankoraŭ pumpstaciojn kun kapacito de 220 000 kilovattoj. Kaj plie oni devas fosi kanalojn kaj dragi la ekzistantajn. Por efektivi la tutan projekton oni devas fosi 150 milionojn da kubmetroj da tero. Post realiĝo de la unuaperioda projekto la stacio Jiangdu ĉiusekunde povos pumpi 500-600 kubmetrojn da akvo (nun 460 kubmetroj). Tiam ĉiusekunde 150 kubmetroj da akvo estos enkondukitaj en la lagon Nansi en Shandong-provinco kaj 50 kubmetroj da akvo fluos en la lagon Dongping.

La projekto realiĝos en 1990. Kaj tiam ĝi radikale plibonigos la akvoliveradon en Xuzhou, Lianyungang kaj aliaj 30 urboj,

kiuj nun konsumas 130 milionojn da kubmetroj da akvo ĉiujare, sed tiam 180 milionojn da kubmetroj da akvo.

Tiam la karba kaj elektra industrioj en norda Jiangsu kaj sudokcidenta Shandong havos stabilan akvoliveradon kaj tiam ĉesos reduktiĝi la industria produkto en la sekaj jaroj. Laŭ nepreciza takso la elektra industrio estos provizita ĉiujare per akvo je 320 milionoj da kubmetroj pli multa.

La Granda Kanalo inter Jangzi-rivero kaj Jining en Shandong-provinco ricevos pli da akvo kaj dank' al tio grandigos sian navigeblecon. Nun sur tiu parto de la akvovojo la navigacio estas sezona pro nesufiĉo de akvo. Sed post realiĝo de la plano, sur tiu parto de la akvovojo la navigopovo leviĝos je pli ol 20 milionoj da tunoj, inkl. de 10 milionoj da tunoj da karbo, kio ege mildigos la streĉitecon de transportado de la Fervojoj Tianjin-Pukou-a kaj Ŝanhajo-Hangzhou-a.

Tiam la pli ol 1 300 000 hektaroj da grenkampoj estos pli efike akvumitaj. 75% de la kserofitoj kaj 90-95% de la riizejoj estos garantiataj en akvumado, sed nun ili estas nur 50% kaj malpli ol 90% respektive.

Ĉu la akvotransigo malbone efikos sur la medion? Ĉu la skistosomozo sin etendos al la nordo? Ĉu graviĝos la grunda saligo kaj alkaliĝo de la kampoj en la nordo? Ĉu malleviĝos la akvosurfaco de la malsupra baseno de Jangzi-rivero? Ĉu pliiĝos sedimentado? Ĉu la akvaj planoj en la lagoj ĉe la akvovojo estos malbone influitaj? Jen problemoj ĝenerale zorgataj de

(Daŭrigota sur p. 8)

VIZITO AL LA ANTAŬA “KORIDORO DE INUNDO”

EN la lasta marto mi vizitis la subprovincon Huaiyin en norda Jianguo-provinco, orienta Ĉinio, historie konata kiel “Koridoro de Inundo”.

DEVENO DE LA NOMO

Huaiyin situas sur la Ebenajo de norda Jianguo, kiun trafluas Huaihe-, Yihe- kaj aliaj du riveroj en siaj malsupraj basenoj. Kiam okazis inundo en la provincoj Henan, Anhui kaj Shandong, la inundakvo fluis en la Flavan Maron tra Huaiyin. Tial historie la loko ricevis la nomon “Koridoro de Inundo”. Kronikoj notis, ke dum la kvincent jaroj de


1400 ĝis 1900, sole en la baseno de Huaihe-rivero, okazis 350 inundoj kaj 280 trosekeoj. La sinsekvaj katastrofoj faris la ducent sesdek ses mil hektarojn da kampoj de la loko sablozaj kaj sala-alkalaj kun malabunda rikolto. La kamparanoj vivis tre mizere. Feŭda imperiestro muldigis naŭ ferajn bovojn kaj metis ilin ĉe Hongze-lago okcidente de Huaiyin, celante regi la inundon. Kompreneble la feraj bovoj neniom efikis. En 1931 okazis serioza inundo de Huaihe-rivero, pro kiu pli ol tri milionoj kaj kvincent mil kamparanoj perdis sian hejmon kaj sepdek sep mil mortis de malsato.

ĈE HONGZE-LAGO

Kun disfalo de la feŭdaj dinastioj ankaŭ kvin el la naŭ feraj bovoj malaperis senspure. Restis ĉe la lago nur kvar feraj bovoj. Ili atestis la gigantan ŝanĝiĝon de Huaiyin dum la pasintaj pli ol 30 jaroj.

En 1949 denove okazis inundo en norda Jianguo-provinco. Malgraŭ sia financa malfacilo, la popola registaro decidis jungi la inundon. Vintre de 1949 kaj printempe de 1950 la loka registaro organizis pli ol kvincent mil homojn por konstrui novan 144-kilometran inundo-ellasan kanalon de Yihe-rivero. Nelson-

Kluzoj en Hongze-gubernio



ge poste oni komencis laboron por jungi Huaihe-riveron. En 1950, okcent mil homoj formovis teraĵojn de okdek milionoj da kubmetroj kaj fosis 168-kilometran Irigacian Trunkan Kanalon de norda Jiangsu dum okdek tagoj. De tiam la furioza inundo estas sukcese jungita.

Nia aŭto veturis laŭ larĝa ombroriĉa vojo kaj fine venis al Hongze-lago. Elaŭtiginte, mi trovis, ke ni jam staris sur la granda digo de la lago. La digo etendiĝas malproksimen. Oriente de ĝi trembrilas la vasta lago kaj okcidente la tritikaj spikoj rulis ondojn da oro, disfloras flavaj kolz-floroj kaj vilaĝaj domoj ripozas inter verdaj arboj, kio formas idilian pejzaĝon. En la knabeco mi jam legis, ke Hongze-lago estas unu el la kvin grandaj dolĉakvaj lagoj de Ĉinio kun areo de dumil naŭdek kvadrataj kilometroj. Tamen mi neniam pensis, ke tiel bela ĝi estas.

Mia kunvojaĝanto, akvomastroma inĝeniero diris al mi multon pri la lago.

Hongze-lago formiĝis el kelkaj malgrandaj lagoj. En la historio la Flava Rivero multfoje superbordiĝis. Kun granda kvanto da sablo la superakvo de la Flava Rivero enfluis en Huaihe-riveron. La sedimento ŝtopis ĝian elirejon en ĝia malsupra baseno. Rezulte de tio ankaŭ Huaihe-rivero ofte inundis kaj la superflua akvo kunigis la malgrandajn lagojn en unu grandan, jen la nuna Hongze-lago. Oni iam konstruis digon ĉirkaŭ la lago, sed pro manko de riparado, la digo detruigis kaj la lago ofte plagis la popolon per sia superakvo.

En 1959, la popolanoj en Huaiyin komencis ordigi la la-

gon. Oni plifortikigis la digon, konstruis sur ĝi kelkajn kluzojn kaj fosis kanalon por regi inundon. En 1954, okazis al Huaihe-rivero eksterordinara superakvo, kiu estis enkondukita en la lagon Hongze. La lago estas plenkla de akvo, dum ekster la digo bone kreskis tritiko sur la senlima kamparo. En 1966 oni rekonstruis la digon. Sur la 67-kilometrojn longa digo oni konstruis kontraŭinundan arbaran zonon kaj masonis ĝian deklivon per ŝtonoj. Dank' al tio la lago povas kaj dreni inundon kaj konservi akvon.

Mi venis al la gubernio Hongze, kiu situas ĉe la orienta bordo de la lago, kaj babilis kun iu oficisto. Parolante pri la lago, li diris: "En la pasinteco, kiam ŝveliĝis la lago en pluva sezono, oni devis breĉigi la digon kaj ellasi akvon, sekve de kio multaj kamparanoj fuĝis al aliaj lokoj." "Kaj nun?" demandis mi. "Nun, sole en nia gubernio, pli ol dudek ses mil hektaroj da kampoj estas irigaciitaj per la akvo de la lago kaj ekster la inunda minaco," li respondis kun rideto.

ĈIUJ ZORGAS PRI AKVOMASTRUMA KONSTRUADO


Samtempe kun starigo de grandaj akvoutiligaj konstruaĵoj, tie estas farata ankaŭ fundamenta konstruado de la kampoj en granda skalo.

En kabineto de ĉiu popola komunumo kaj produkta brigado de la subprovinco Huaiyin pendas tri grafikaĵoj kiuj montras respektive la antaŭan kaj nunan staton kaj projekton de la loka akvomastromado. Ĉiuj kadroj de la komunumoj kaj brigadoj bone konas lokiĝon de la kanaloj, pontoj, kluzoj, kulvertoj, pumpstacioj kaj aliaj malgrandaj akvoutiligaj instalaĵoj en sia loko.

Ne nur kadroj, sed ankaŭ ordinara kamparanoj en Huaiyin zorgas pri la akvoutiliga konstruado.

Iu gvidanto de Huaiyin, kiam li inspektis laboron en la kamparo, demandis maljunan kampulon: "Kio estas ŝlosilo por ŝanĝi la fizionomion de nia loko?" La kamparano respondis senpripense: "Kompreneble akvoutiliga konstruado!"

Pumpstacio en Suqian-gubernio



Tie ankaŭ mi renkontis iun kamparanon, kiu diris al mi, ke pasintjare kiam ilia brigado planis fosi kanalon kaj konstrui ponton, mankis konstruaj materialoj. Multaj komunumanoj do oferis por tio siajn proprajn lignojn kaj brikojn. Ili opiniis, ke ili povas mem fari malgrandajn akvoutiligajn konstruaĵojn, sed ne devas nur dependi de la ŝtato.

Mi venis al la produkta brigado Qinggao de Dawa-komunumo, Suqian-gubernio, norde de Hongze-lago. La sekretario de la partia filio de la brigado min bonvenigis ĉe vilaĝenirejo. Montrante tritikkampojn, li diris al mi, ke en la pasinteco ili estis malebenaj kaj malkompaktaj kun multe da gruzoj. En la sesdekaj jaroj, la membroj de la brigado ĉiu sin ĵetis en la laboron por reformi la grundon kaj mastrumi akvon. Ili forportis cent kvindek mil kubmetrojn da gruzoj kaj ebenigis la kampojn. Nun la kampoj de la brigado estas en bonordaj kvadratoj, irigaciataj per kanaletoj.

PLI BONA OL SUDA ĈINIO

Oni diras, ke la loko sude de Jangzi-rivero estas la plej riĉa. Tamen, vizitinte nordan Jiangsu mi konvinkiĝis: Ĝi estas riĉa same al suda Ĉinio. Kaj Huaiyin meritas la nomon de lando riĉa je fiŝoj kaj rizo.

La akvomastrumaj konstruaĵoj faritaj en la lastaj pli ol tridek jaroj sin prezentas kiel bona kondiĉo por ŝanĝi la fizionomion de Huaiyin. Nun oni jam povas unuapaŝe regi ordinarajn superakvon, trosekecon kaj salo-alkalon. La areo de irigaciataj kampoj superis sescent mil hektarojn. La antaŭe sterila tero fariĝis kampoj kiuj donas riĉan

rikolton kaj en trosekeco kaj en superakvo.

En la lastaj jaroj, la kamparanoj de Huaiyin kulturis rizon en granda areo, kaj pro tio multe pliiĝis la produktokvanto de grenoj. En 1982, la produktokvanto de grenoj en Huaiyin atingis kvar milionojn kaj okcent dek mil tunojn, je kvar milionoj da tunoj pli multe ol tiu en 1949. En 1978, Huaiyin trafis malofta sekegeco. La akvo en Hongze-lago reduktiĝis. Tiam la kamparanoj multe profitis el la akvoutiligaj konstruaĵoj. Ili kondukis akvon de Jangzi-rivero kaj subteran akvon al la akvosoifaj kampoj, tiel ke rizplantidoj en pli ol ducent sepdek mil hektaroj da kampoj estis ĝustatempe transplantitaj. En tiu jaro la popolanoj akiris abundan rikolton. En la lastaj pli ol tridek jaroj okazis en Huaiyin 15 trosekecoj kaj 11 superakvoj, sed la loko sukcese eltenis ĉiujn provojn kaj nun ĝi fariĝis unu el la gravaj produktotejoj de greno en nia lando.

En la ĉina lingvo "Suqian" signifas "transloĝiĝo en unu nokto". Legendo diras, ke prauloj de la tieaj loĝantoj, pelate de inundo, forlasis sian hejmlokon kaj en unu nokto enloĝiĝis ĉi tien. Pasinteco, en la gubernio estis kvardek mil hektaroj da salaj-alkalaj kampoj, kies plej malalta hektara grena produktokvanto estis nur iom pli ol kvindek kilogramoj! Nun granda ŝanĝiĝo okazis en tiu ĉi gubernio. Ĉie estas ebenaj kampoj, verdaj arbarzonoj kaj interkruciĝantaj kanaloj. Mi vizitis la popolan komunumon, kies hektara grena produktokvanto antaŭe estis nur kvindek kilogramoj. Nun ĝia hektara riza produktokvanto superis 7.5 tunojn. En

la pasinta jaro, la komunumo vendis al la ŝtato 1 525 tunojn da grenoj, 84 kamparanaj familioj vendis al la ŝtato po kvin tunojn. Pli ol kvarcent kamparanaj familioj aĉetis mantraktaron.

Forlasinte Suqian-gubernion, mi veturis orienten kaj venis al la gubernio Lianshui. Kiam mi atingis la gubernian urbon, jam vesperiĝis. Dum vespermanĝo, kelnero de la gubernia gastodomo surtabligis sinsekve pladojn el granda karmo, bongusta angilo kaj fiŝviandaj buletoj. En la manĝejo ŝvebis bonodoro de fiŝo-pladoj. Kadro de la gubernio diris al mi, ke en la lastaj jaroj dank' al la akvoutiliga konstruado, la gubernio havas pli da akvujoj, kie nun brediĝas 650 000 fiŝoj. Nun la popolanoj povas ofte frandi fiŝojn.

La sekvantan tagon, mi vizitis familion de komunumanino Wang Cuilan. Ŝia familio kun naŭ membroj loĝas en nova tegoltegmeta domo kun ok ĉambroj, el kiuj du por kuirejo. Ŝi diris al mi, ke en la lastaj jaroj, dank' al akvomastruma konstruado, la kamparanoj vivas stabile kaj forte deziras konstrui por si novan domon pro plimultiĝo de ilia enspezo. Por solvi la problemon de lignoj en domkonstruado, la produkta brigado hakis du hektarojn da arboj kaj ilin distribuis al la komunumanoj.

Antaŭe, la kamparanoj de Huaiyin loĝis en malaltaj terkabanjoj, ne nur pro manko de monrimedoj, sed ankaŭ pro ofta transloĝiĝo okaze de inundo. Nun la popolanoj de Huaiyin vivas feliĉe kaj stabile.

(B. v. la bildpaĝon "Nova Fizionomio de la Irigacia Sistema de Jiangsu")



Faksimila telegrafilo en la Pekina Telegrafa Centro

SHANG CUIYUN:

La ĉina poŝta kaj telekomunika afero

LA 36-a Ĝenerala Asembleo de UN proklamis la jaron 1983 Monda Komunika Jaro. Pro tio fondiĝis en Pekino la Ĉina Komitato de la Monda Komunika Jaro en decembro 1982. Laŭ la temo de tiu jaro, la komitato aranĝis en Ĉinio ĉi-rilatan simpozion kaj tutlandan konkurson de fotoj kaj pentraĵoj de geknaboj kaj emisiis memorigajn poŝtmarkojn. Cetere Ĉinio partoprenos en internacia foiro de

libroj kaj revuoj pri telekomunikado, en filmofestivalo kaj en konkurso de pentraĵoj de geknaboj.

Komunikado strikte rilatas al civilizacio kaj progreso de la homaro. Laŭ skribaj notoj, frue antaŭ 3 000 jaroj en Ĉinio jam aperis komuniko. Antaŭ 2 700 jaroj naskiĝis en ĝi alarmoturoj por komuniki signalon. Tiaj turoj konstruiĝis ĉirkaŭ la ĉefur-

boj de la regnoj je certa distanco. Kiam venis malamiko, oni estigis fumon tage kaj bruligis fajron nokte kaj per malsamaj signoj informis la nombron de invadantoj. Nun sur la Granda Muro de Ĉinio ankoraŭ videblas postsigno de tia konstruaĵo. Post tio aperis en Ĉinio poŝtveturado pli frua en la mondo. Sur la grandaj vojoj estis poŝtaj ĉevaloj kaj kaleŝoj por transdoni dekretojn de la registaro. En siaj

(Daŭrigo de p. 4)

la tuta socio. La unuapaŝa esplorado diras al ni, ke la supremenciitaj problemoj povos esti solvitaj. Kompreneble, nun mankas sperto al ni por granda konstruaĵo kia akvotransigo de la sudo al la nordo. En la eston-

teco estiĝos ankoraŭ aliaj studindaj problemoj.

Post kiam la Ŝtata Konsilantaro aprobis la unuaperiodan projekton de la akvotransigo ĉe la orienta linio, la akvoadministra kaj scienca departementoj de nia lando nun komencas studi

pri la duaperioda projekto, t.e. konduki akvon trans la Flavan Riveron kaj rekte al la urbeĝo Tianjin. Solvi la problemon pri akvomanko en norda Ĉinio estas tasko solvenda en la longa periodo, kio bezonas nian persistan laboradon.

vojaĝnotoj la itala vojaĝisto Marko Polo montris sian grandan admiron al la ĉina poŝto.

En la sepdekaj jaroj de la 19-a jarcento, laŭlonge de la ĉefaj fervojoj estis starigitaj specialaj linioj por telegrafa komuniko. En la fino de la 19-a jarcento kaj la komenco de la 20-a jarcento Ĉinio komencis telefonkaj radiokomunikojn kaj starigis telekomunan rilaton kun najbaraj landoj.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en oktobro de 1949, la ĉina poŝta kaj telekomuna afero enpaŝis en novan periodon. Nun en la vasta tero de Ĉinio kun la ĉefurbo Pekino kiel centro formiĝis telekomuna reto el malfermaj linioj, kabloj, mikroondoj kaj kurtaj ondoj, kiu interligas diversajn lokojn en kaj ekster la lando. Ĝis la fino de 1982, la totala longeco de la poŝtaj linioj de la tuta lando pliiĝis je 5.6-oblo kompare kun tiu de 1949; kompare kun tiu de 1950 tiu de la linioj por longdistanca telefono preskaŭ 9-oble pliiĝis, tiu por telegrafo 3-oble,

la kapacito de la urb-telefona centralo pligrandiĝis je 6.7-oblo, en la kamparo nun funkcias 2.49 milionoj da telefonaj konektiloj. 99.6% de la popolaj komunumoj kaj 95.9% de la produktaj brigadoj estas atingeblaj per poŝto, kaj 95.5% de la popolaj komunumoj kaj 58% de la produktaj brigadoj atingeblaj per telekomuniko. Ĉinio starigis poŝtan rilaton kun 110 landoj kaj regionoj de la kvin kontinentoj kaj funkcias linioj por telefono, telegrafo, domtelegrafo kaj faksimilo inter Ĉinio kaj 46 landoj kaj regionoj. En la tuta lando troviĝas preskaŭ 50 000 poŝtoŝtancoj, je 88.9% pli multe ol tiuj en 1949. Pli ol 80% de tiuj poŝtoŝtancoj sin lokas en la kamparo. Multe leviĝis ankaŭ la teknika nivelo de telekomuniko, kio montriĝis jene:

1. Ĉinio intensigas konstruadon de moderna komunika reto kun portanta kurento de grandkapacita samaksa kablo kaj mikroondoj kiel la spino. Nun oni jam plenumis mikroondan linion de pli ol 14 500 kilometroj, kiu


interligas 26 provincojn, municipojn kaj aŭtonomajn regionojn por transsendado de telegrafo, telefono, faksimilo kaj televidaj kaj disaŭdigaj programoj. La jam finkonstruita samaksa telekomunika linio kurentoportanta kun 1 800 kanaloj inter Pekino, Ŝanhajo kaj Hangzhou metis teknikan bazon por konstrui la komunikan reton el ĉefaj linioj de la lando. Nun en 24 provincaj urboj de Ĉinio jam efektiviĝis aŭtomata aŭ duonaŭtomata kontinuigado de longdistanca telefono dank' al uzo de kabloj kaj mikroondoj.

2. Ĉinio ĉiamaniere aŭtomatigas sian telefonan kaj telegrafan komunikon. Ĝi mem fabrikis telefonan konektilon de spac-divida elektronika kaj duonelektronika aŭtomata konektilo, longdistanc-telefonan konektilon de koda kruc-bara sistemo, senŝnuran ŝaltan tabulon, pulsant kod-modulilon, videotelefonon, skriban telefonon kaj aliajn komunikajn aparatojn, metinte per tio materian kaj teknikan bazon por modernigi telefonon. Krom ĉiuj provincaj ĉefurboj kaj municipoj, du trionoj de la mezgrandaj urboj kaj parto da gubernioj ekuzis aŭtomatan telefonon. Ĉinio vaste uzas propre fabrikitan deĉifrilon de la ĉina lingvo, kiu povas konservi dek mil ĉinajn ideografiaĵojn. Ĝi povas aŭtomate trovi respondajn ĉinajn ideografiaĵojn laŭ la kodo de kvar arabaj ciferoj kaj rekte fari duplikaton de telegrafa teksto de la ĉina lingvo, kio multe ŝparis tempon kaj homfortojn.

3. Oni atingis certan progreson en faksimila kaj donitaĵa komuniko. Ĉinio produktis plurspecajn faksimilajn ekipaĵojn kaj starigis faksimilan komunikan reton en la landa skalo,

En ĉambro de aŭtomataj telegrafaj konektiloj programe re-gataj, en Kantono





La Pekina Generala Mikroonda Stacio

kiu rapide kaj efike transsendis jurnalismajn fotojn, gazetojn, dokumentojn, grafikojn kaj aliajn informojn. Krome, ĝi sukcese fabrikis plur-rapidecan donitajan transsendan aparaton; aplikante teknikon regi erarojn, ĝi povas bonkvalite transsendi ciferajn signalojn per analoga komunika kanalo kaj samtempe ĝi sukcese produktis kompletan da klemajn ekipaĵojn. En 1980 la komunika departemento disponigis elektran kanalon al la kalkula centro de la ŝtato.

4. Ĉinio fundamente plenumis specialan reton por internacia komunikado. En Pekino kaj Ŝanhajo stariĝis tri surteraj stacioj de komunika sputniko, kiuj havas komunikan rilaton kun diversaj landoj pere de internaciaj komunikaj sputnikoj super la Hindia Oceano kaj Pacifiko, funkcias internaciaj servoj en 19 malfermaj urboj kaj instaliĝis konektiloj por internaciaj domtelegrafoj. De 1980 Ĉinio malfermis duonaŭtomatan kanalon inter Pekino kaj Ŝanhajo kaj Japanio, Usono kaj aliaj kvin landoj kaj regionoj. Inter Pekino kaj Japanio malfermiĝis rapida faksimila telegramo. Kro-

me, Ĉinio funkciigis ekspresan poŝtservon kun FR Germanio, Usono, Argentino kaj aliaj dek landoj kaj Hongkong kaj Aŭmen.

5. Ĉinio aktive esploras novajn komunikajn teknikojn. Nun ĝi havas pli ol 3 000 poŝtajn kaj telekomunikajn entreprenojn, pli ol 60 tiuflankajn institutojn kaj lernejojn kun sume kelkdek mil fakuloj. Ĉinio fundamente posedas teknikojn pri konektado, kablo, mikroondoj kaj sputniko kaj traktado de poŝtajoj necesajn por organizi modernan komunikan reton. Ĝi akiris ĝojigan progreson ankaŭ en fibrooptika kaj cifera komunikadoj.

Kompare kun avangardaj landoj, Ĉinio ankoraŭ estas tre postiĝinta en la poŝta kaj telekomunika afero. Por rapide disvolvi tiun aferon, Ĉinio jam difinis la telekomunikan konstruadon kiel unu el siaj gravaj konstruobjektoj en la disvolvo de la nacia ekonomio. Estonte ĝi rapidigos unue la konstruadon de telefona sistemo en la urboj, due reformadon kaj disvolvadon de longdistanca telekomunikado

kaj trie konstruadon de poŝta kaj telekomunika centroj. Rilate al internacia komunikado Ĉinio aktive sin preparas por konstrui kaj enkonduki internaciajn komunikajn instalaĵojn en Pekino, Ŝanhajo kaj Kantono kaj plibonigas komunikajn kondiĉojn en marbordaj urboj, gravaj havenoj kaj aliaj malfermaj urboj. Krome Ĉinio konstruos sputnikan surteran stacion en Xinjiang, Interna Mongolio kaj Tibeto pere de luo de kanalo de internaciaj komunikaj sputnikoj por ŝanĝi la postiĝintan fizionomion de komunikado en tiuj landlimaj lokoj. Samtempe ĝi klopodas por perfektigi la komunikan reton en la kamparo.



Kaŭĉukarboj sukcese kulturataj en la regionoj inter 18°-24° N

“Ĉinio jam estas grava kaŭĉukprodukta lando kaj iras antaŭ aliaj landoj en iuj kaŭĉukesploraj kampoj.” Tiujn vortojn donis Tan Sri D-ro B. C. Sekhar, prezidanto de la Internacia Komitato pri Esplorado kaj Disvolvado de Kaŭĉuko en la jarkunveno de la komitato okazinta maje ĉi-jare en Pekino.

La takso de D-ro Sekhar pri la ĉina kaŭĉukarba kulturado estas objektiva. Ĉinio sukcese kulturis kaŭĉukarbojn grandaree en regionoj inter 18°-24°N. Tio estas grava rompo de la tradicio en la monda historio de kaŭĉukarba kulturado. Nun, Ĉinio havas 161 ŝtatajn kaŭĉukarbajn kultivejojn kun areo de 453 000

hektaroj kaj en 1982 produktis 150 000 tunojn da seka kaŭĉuko. Inter la 37 kaŭĉukproduktaj landoj Ĉinio okupas la kvaran lokon koncerne al la kulturata areo kaj la kvinan lokon koncerne al la produktokvanto de seka kaŭĉuko.


POR TRANSPLANTI KAŬĈUKARBOJN NORDEN DE LA KUTIMA LATITUDO

La kaŭĉukarboj estas tipe tropikaj arboj, kiuj origine kreskis nur en la basenoj de Amazono en Brazilo. Ili kutime kreskas sur fekunda senventega grundo kun alta temperaturo kaj granda humideco. La “Brita Enciklopedio” de la 15-a eldono en 1980

montras, ke “la kaŭĉukarboj kreskas” nur en la tropika zono “inter la 10-gradaj suda kaj norda latitudoj”. La sudaj partoj de la provincoj Guangdong, Yunnan, Fujian kaj la regiono Guangxi, Ĉinio, apartenas al la tropika kaj subtropika musonaj zonoj kaj havas areon de ĉ. 480 000 kvadrataj kilometroj, kiuj konsistigas 5% de la totala teritorio de nia lando. Tiuj lokoj kun alta temperaturo kaj abunda pluvo taŭgas por kulturigi kaŭĉukarbojn kaj aliajn tropikajn plantojn, pro kio ili formas specialan agrikulturan regionon de Ĉinio. Sed, la ĉinaj kaŭĉukarbaj kultivejoj situas inter 18°-24° N, multe pli altlatitudo ol la kutima limo de la mondo. Tie la plej granda malfacilo en kulturado de kaŭĉukarboj estas la frostaera atako.

La frosta aerfluo suden blovanta de la orienta parto de Siberio, la insulo Nova Tero kaj la okcidenta parto de la eŭropa kaj azia kontinentoj certgrade minacas la ĉinajn kaŭĉukarbajn ĝardenojn. Precipe la frosta aerfluo tra la meza parto de Mongolio povas kaŭzi al la kaŭĉukarboj de suda Ĉinio pereigan fatalon. Post multjara esplorado la ĉinaj sciencistoj bone konis la diversajn frostaerajn atakojn kaj ilian formiĝon, la frostrezistivon kaj necesajn temperaturajn kondiĉojn por diversaj kaŭĉukarboj, kaj sekve eltrovis efi-

Asistanta esploristo Zheng Xueqin (la unua de dekstre) kaj liaj helpantoj



kajn rimedojn kontraŭfrostajn por selektitaj specioj de kaŭĉukarboj.

La alia minaco al la kaŭĉukarboj estas vento. Laŭ observado la vento super indico 3 (kun rapideco de tri metroj ĉiusekunde) povas disŝiri junajn foliojn de kaŭĉukarbidoj. Por **sane kreski** kaŭĉukarbidojn necesas absolute senventega medio. Sed, la tajfuno devenanta de la oceano oriente de Filipinoj kaj de la Suda Ĉina Maro inter 5°-20° N surbordiĝas ĉe suda Ĉinio. Tio estas serioza minaco al la kaŭĉukarboj kulturataj en suda Ĉinio. Por preventi kaj mildigi la katastrofon de tajfunoj la ĉinaj kaŭĉukarbaj kulturistoj faris forstumadon por formi ventbarajn forstozonojn kaj plantas ventrezistemajn kaŭĉukarbidojn. La praktiko pruvis, ke tiuj rimedoj estas efikaj. En 1980 la insulo Hainan suferis atakon de forta tajfuno, sed nur 7% de la kaŭĉukarboj protektataj de forstozonoj rompiĝis aŭ falis.

Ĉinaj sciencistoj, teknikistoj kaj laboristoj de kaŭĉukarba kulturo atingis grandan sukceson en ventŝirmado kaj frostrezistado, tial la kaŭĉukarboj povas sane kreski en tiuj lokoj. En 1982 tiu sukceso ricevis unuaklasan premion de la Ŝtata Scienca kaj Teknika Komisiono de Ĉinio.

SCIENCESPLORA SISTEMO

Unu el la gravaj kaŭzoj de la sukceso de grandarea kulturado de kaŭĉukarboj inter 17°-24° N kaj la rapida disvolviĝo de tiu afero en Ĉinio kuŝas en tio, ke tie fondiĝis kaŭĉukesploraj institucioj kaj stariĝis sciencesplora sistemo pri tiu fako.

En la komenco de la kvindekaj jaroj fondiĝis la Instituto de Tropikaj Plantoj en la kadro de la Sudĉinia Terekspluata Buroo kaj eksperimentejoj en la bazo de kaŭĉukarba kulturado. Depost tiam oni komencis esplorado pri semselekto, arbidkulturo, generado, transplantado, gumokolektado kaj aliaj temoj. Kun paso de la tempo Ĉinio jam fondis iom post iom relative kompletan sciencesploran sistemon pri kaŭĉukoproduktado. Nun, Ĉinio havas 21 sciencajn instalaĵojn pri tropikaj plantoj kun esplorado de kaŭĉukoproduktado kiel la ĉefa tasko en 4 sudaj provincoj, kaj ĉ. 1 000 esplorantojn de tiu fako. Krome funkcias la Sudĉinia Scienca Akademio de Tropikaj Plantoj kaj la Sudĉinia Instituto de Tropikaj Plantoj. Ili estas nun la plej perfektaj institucioj de esplorado kaj instruado pri kaŭĉuko en Ĉinio.

La ĉefa tasko de la akademio estas esplori la problemojn de tropikaj plantoj, inkluzive de arbidkulturado, transplantado,

plantoprotektado, mekanikigo, prilaborado de produktaĵoj, sinteza utiligo, dislokado de tropikaj riĉfontoj kaj aliaj temoj.

Sub la akademio laboras pluraj eksperimentejoj kaj ses institutoj pri kaŭĉukarba kulturado, plantado de tropikaj plantoj, plantoprotektado, sciencaj kaj teknikaj informoj, prilaborado kaj projektado de tropikplantaj produktaĵoj kaj mekanikigo en kultivado de tropikaj plantoj.

De multaj jaroj la akademio sukcese plenumis pli ol 70 esplortemojn ekspertizitajn, kaj la fruktoj de 58 el iliaj esplorobjektoj estis premiitaj de la Terekspluata Ministerio kaj la Provinca Scienca kaj Teknika Kongreso. Interalie, la plantado de kaŭĉukarboj en pli nordaj regionoj, la frua prognozado de produktokvanto de kaŭĉukarboj kaj la polenokulturado jam atingis la mondan avangardan nivelon. Asistanta esploristo Zheng Xueqin finis sian universitatan studon en 1952 kaj nelonge post tio venis al Hainan-insulo por sin

En kaŭĉuka ĝardeno





En kaŭĉuka ĝardeno de Hainan-insulo

okupi per esplorado pri kaŭĉukarba kulturado. En 1963 li komencis esplori la fruan prognozozon de produktokvanto de kaŭĉukarboj kaj atingis sukcesojn en la lastaj jaroj. La kaŭĉukarboj estas multjaraj plantoj, kaj la periodo por kulturi

novan specion de kaŭĉukarboj bezonas 30 jarojn ĝenerale. La frua prognozado de produktokvanto de kaŭĉukarboj estas ŝlosilo por mallongigi tiun periodon. La prognoza metodo ĉefe aplikata de la kaŭĉukoproduktaj landoj estas enranĉado aŭ pika-

do al la arbotrunko, tial la plej frua prognozo devas esti farita post 33-monata kresko de la arbido. La scienca frukto de Zheng Xueqin plifruigis la periodon je 8-10 jaroj. En 1981 li, kiel reprezentanto de Ĉinio, partoprenis en la semokolektado organizita de la Internacia Komitato pri Esplorado kaj Disvolvado de Kaŭĉuko, kaj dume li faris observadon kaj enketadon en tropikaj praarbaroj en la baseno de Amazono, Brazilo, kune kun pli ol 20 specialistoj de sep landoj. La materialoj de li kolektitaj tie estas valoraj por elkulturi novajn speciojn de kaŭĉukarboj.

Por plifortigi la kulturen interesanĝon kun aliaj landoj la akademio aliĝis al la supre menciita komitato en 1981.

La nomita instituto celas kulturi teknikistojn kaj administrantojn pri tropikaj plantoj ĉefe por la sudaj 4 provincoj. Nun, ĝiaj diplomitoj kontribuas siajn fortojn al disvolvo de la ĉina kaŭĉuka afero.




LA JIANGSU-A ESPERANTO-ASOCIO FONDITA

De la 5-a ĝis la 7-a de julio okazis en Nankino la inaŭguro de la Jiangsu-a Esperanto-Asocio kaj ĝia unua Esperanta simpozio. Hu Fuming, vicestro de la Propaganda Departemento de la Kompartia Komitato de Jiangsu, Wang Huai-bing, vicprezidanto kaj ĝenerala sekretario de la Filozofia-sociscienca Federacio, kaj aliaj respondeculoj ĉeestis la inaŭguron kaj faris paroladojn.

Zhu Yigui faris laboran raporton.

La kunveno aprobis la statuton de la asocio kaj elektis ĝian konsilantaron. Zensto, Zhu Yigui, Hua En kaj Wang Chongfang estis elektitaj kiel ĝiaj prezidanto kaj vicprezidantoj.

La kunveno ricevis 21 disertaĵojn. Zensto, Zhu Yigui kaj Sun Guohui faris paroladojn respektive sub la titoloj «Esperanto kaj Ĝia Movado», «Pri Fonema Sistemo de Esperanto kaj Aliaj Problemoj» kaj



Ferma ceremonio de la dua porinstruista Esperanto-kurso

«Unua Esploro pri Esperanta Instruado».

LA DUA PORINSTRUISTA ESPERANTO-KURSO FINITA

La dua porinstruista Esperanto-kurso okazigita de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj daŭranta 10 monatojn finiĝis en la komenco de julio. La 6-an de julio oni okazigis ferman ceremonion, kiun ĉeestis Li Naixi, vicĉefsekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, kaj Ning Junwei, respondeculo de la Pekina Fremdlingva Kolegio. La 27 kursanoj jam revenis al sia posteno. Ili esprimis, ke ili neniam vanigos la esperojn de veteranaj esperantistoj, kaj aktive propagandos kaj disvastigos Esperanton en diversaj lokoj de la lando.

ESPERANTO-POŝTMARKOJ EKSPONITAJ EN NANKINO

Por celebri la fondiĝon de la Jiangsu-a Filatelista Asocio, la Poŝta kaj Telekomunika Administracio de Jiangsu-provinco kaj aliaj unuoj kune okazigis en Nankino de la 9-a ĝis la 14-a de junio Filatelan Ekspozicion de Jiangsu, la unuan en la provinco post la fondiĝo de la nova Ĉinio. La ekspozicio eksponis 180 albumojn kun pli ol 50 000 poŝtmarkoj. La nankina esperantisto Song Shengtan montris siajn Esperantajn poŝtmarkojn kaj gajnis triaklasan premion. Lian albumon la Jiangsu-a Filatelista Asocio proponis al la Tut-Ĉinia Filatela Ekspozicio okazigota en Pekino novembro de 1983. La plej granda ĵurnalo de la provinco «Xinhua Ribao» publikigis la artikolon «Unu Valora Albumo de Esperanto-filatelito».

NOVA INFANA ESPERANTO- KURSO

Post la infana Esperanto-kurso en infanĝardeno de la Pekina Lingva Instituto, oni fondis alian infanan Esperanto-kurson en la Changji-a Huj-nacieca Aŭtonoma Subregiono de Xinjiang en la fino de majo. La kurso, kiu daŭros tri

jarojn, akceptis 30 kvar-jarajn infanojn. Ili lernas du fojojn ĉiu-semajne, po 20-25 minutoj ĉiufoje. La kurson gvidas eminenta esperantisto. Ĝi ricevis subtenon de la Eduka Buroo de la Changji-a Huj-nacieca Aŭtonoma Subregiono kaj la prepara grupo de la Changji-a Esperanto-Asocio.

«FREMDA LINGVO» PUBLI- KIGIS ARTIKOLON PRI ESPERANTO

En la tria numero de 1983 de «Fremda Lingvo», revuo de la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto, oni publikigis la artikolon de Wei Yuanshu, vicestro de la instituto, «Esperanto — ideala internacia helpa lingvo de la homaro», dividitan en tri partojn: «Esperanto estas produktajo de disvolviĝo de la homa socio», «Internacieco, karakterizaĵo de Esperanto» kaj «Interkomunikado, funkcio de Esperanto».

«E-AMANTO» APERIS

La monata Esperanta revuo «E-amanto» redaktita de la Huainan-a Koresponda Lernejo de Esperanto aperigis sian unuan numeron en la 15-a de junio. Per ĝi oni anstataŭigis la gazeton «Maroto». La revuo, duone en la ĉina lingvo kaj duone en Esperanto, traktas esperantologion, informas pri Esp-movado de Ĉinio kaj aliaj landoj, recenzas Esperantajn librojn kaj gazetojn, diskutas pri iuj problemoj de nia movado kaj studas metodon de Esperanto-instruado por interŝanĝi sperton. Oni distribuas 30 000 ekzemplerojn ĉefe al lernantoj de elementaj kaj mezgradaj Esperanto-kursoj.

JUBILEAS «VOĈO»

En 1983 «Voĉo», Jugoslava Esperanto-Revuo, festos sian 10-jaran seninterrompan aperadon, kio estas rekordo en Jugoslava E-movado.

Post «La Suda Stelo», «Voĉo» estas la plej konata jugoslava gaze-

to, kiun dum tiu tuta tempo redaktas s-ro Dušan Adnadj kaj eldonas E-societo «Fratoj Ribar» el Borovo. La revuo estas primovada, literatura, socia kaj kultura, 20-paĝa, dumonata gazeto, en kiu kunlaboras elstaraj jugoslavaj esperantistoj.

SPECIALA OFERTO

Eldonejo & Librejo Sonorilo donas inter 05.10.83 kaj 01.03.84 aŭtomate rabaton de 5%, se ties fakturo por via mendo estas pli ol 500 BF.

Aerpoŝtaj papero kaj kovertoj kun stelo kaj la vorto «Esperanto». Eldonis: Eldonejo Sonorilo, Doornstraat 22, 8-2610 Wilrijk, Belgio. Prezo: 360 belgaj frankoj por 50 folioj kaj 50 kovertoj (inkluzive de la sendokostoj).

LA TRIA PACIFIKA KONGRESO DE ESPERANTO

Laŭ anonco de la Loka Kongresa Komitato okazos la Tria Pacifika Kongreso de Esperanto dum 14-19 julio 1984 en la urbo Portland, Oregon, Usono.

La pacifikaj kongresoj estas aranĝitaj de Esperantistoj en kelkaj landoj de la pacifika regiono. La Unua Pacifika Kongreso okazis en 1976 en Aŭstralio, helpe de la Aŭstria Esperanto-Asocio, kaj la Dua en 1980 en Vancouver, Kanado, helpe de la Kanada Esperanto-Asocio.

JARA KAJERO DE SAT-AMIKARO

Survoje al la centa datreveno de Esperanto, SAT-Amikaro denove eldonis jaran kajeron, per kiu ĝi celas plue popularigi Esperanton. La ĉefartikolo temas pri la pedagogia valoro de Esperanto-instruado tradukita el «Esperanto in the modern world» kompilita de R. kaj V. Eichholz. La publikigo de tiu ĉi artikolo celas helpi en la klopodoj por la leĝpropono por instruado de Esperanto kaj por plifortigi laŭ nombro kaj kvalito la E-instruistaron.

En tiu ĉi rubriko ni aperigas recenzojn pri Esp-ajoj, kiujn la eldonistoj sendis al ni po-du-ekzemplere, kaj nur mencias tiujn ricevitajn po-unu-ekzemplere. Ni ankaŭ bonvenigas recenzojn faritajn de alilandaj seriozaj samideanoj kaj ilin rekom-pencas pro la kontribuajoj per niaj Esp-aj eldonaĵoj aŭ ĉinaj metiartaĵoj. La redakcio ne prenas sur sin la respondecon pri la laŭdoj aŭ kritikoj de la recenzantoj.

LA RED.

Memoru la militon

Nudpieda Gen de Nakazawa Keizi tradukita de Isumi Yukio, eldonita de RONDO GEN (adr.: p/a SYOZI Keiko, 3-7-15 Nisinip-pori, Arakawa-ku, Tokio, 116 Japanio). Formato: 15 × 21 cm. 288 p. Prezo: 27 gld. plus 10% por sendkosto por mendo ĉe UEA kaj por pogranda mendo de almenaŭ 20 ekz. ĉe RONDO GEN 20 gld. plus 15% por sendkosto.

Temas pri Esperanta traduko de la unua volumo (la plej verve verkita laŭ aserto de la aŭtoro) de sepvoluma bildrakonto aperinta en pli ol miliono da ekzempleroj kaj varme akceptata en Japanio. Ĝi vivece rakontas pri la vivo de la familio de knabo Gen en Hiroŝima ĉirkaŭ la eksplodo de la unua atombombo. Pro tio, ke la patro de Gen dubis pri la venkocerteco de Japanio kaj sintenis kontraŭ la milito, li estis punata per enkarcerigo kaj liaj familianoj estis insultataj kaj ricevis ankoraŭ pli multajn malfacilojn, sen kio ili jam vivis mizere pro manko de vivbezonaĵoj dum la milito. Preskaŭ ĉiuj bildoj de la libro montras okulojn ĉagrenajn, larmantajn, kolerajn aŭ terurplenajn kaj kelkaj el ili, precipe tiuj pri la katastrofo kaŭzita de la unua atombombo, naŭzas per

sangoverŝo. Efektive la bildrakonto estas kvazaŭ aŭtobiografio de la aŭtoro, kiu perdis siajn patron kaj gefratojn en la Hiroŝima infero. Kvankam la originalo aperis en la fino de la sesdekaj jaroj, tamen ĝi ankoraŭ ne perdis sian aktualan signifon hodiaŭ, kiam Marso minacas la homaron per sia terura ludilo. Per sia verko la aŭtoro kvazaŭ diradas al ni: Memoru la militon! Jes, ni ne devas forgesi la teruran detruadon de vivoj kaj kreaĵoj de homoj, se ni ne volas novan eĉ multe pli teruran. Estas pripensinde, kio estas la vera kaŭzo de la militoj kaj kiel oni povas efike ilin eviti.

La lingvo de la tradukaĵo estas ĝenerale klara kaj kelkloke eĉ garnata per freŝaj esprimoj kiel ekzemple "Vivu kaj helpu krei mondon, kie oni estas liberaj malkiel ni. . ." (p. 159) Mi dubas, ĉu estas necese enkonduki multajn novajn interjekciojn kaj onomatopeojn kiel ekzemple BANZAI, GJAK, ĤOJS, FEK, BONK, DZAK, BURR, BAMB, ĴUP, RAT, TAT, ZOOM, TRINĈ, TRAC. Mi ankaŭ povus rimarkigi kelkajn korektendaĵojn kiel ekz.: "Ĉiu (legu ĉiuj) devas helpi unu alian" (p. 50), "Kiom da fojoj vi demandas (legu demandis)" (p. 21), "Neniam reskribu, ke milito estus (legu estas) malbona" (p. 53), "Kion vi pensas, ke vi faras?" (Eble oni volus diri ĉi tie: Kion, laŭ via penso, vi faras?) (p. 56), "Mi ne toleros eĉ unu vorton, kvazaŭ miaj infanoj estus ŝtelistoj" (Eble oni volus diri ĉi tie: Mi ne toleros, ke oni kalumniu, eĉ per unu vorto, ke miaj infanoj estas ŝtelistoj.) (p. 81), "Tiel ili premkatenis la popolon, trudis ĝin (legu al ĝi) al kunlaboro (legu kunlaboron) por la milito" (p. 176) kaj "ĝentile (milde aŭ malforte) tenu ĝian kapon" (p. 282).

La bildoj estas vivecaj kun tendenco de troigo. La papero kaj bindo estas altkvalitaj, la presaĵo estas tre klara. Do la verko taŭgas ne nur por legado, sed ankaŭ por

ekspozicioj pri Esperanta literaturo kaj montrado al neesperantistoj-pacamantoj.

Recenzis V. K.

Nove ricevitaj libroj


ELEKTITAJ SONETOJ de G. G. Belli, el la roma dialekto tradukis Gaudenzio Pisoni, reviziis Renato Corsetti, kun enkonduko de Carlo Minnaja. Eldonita de Cooperativa Editoriale Esperanto. Formato: 15 cm. × 21 cm. 70 p. Prezo ne montrita.

FENESTRO KRISTALA de Julia Piro (Kolekto de originalaj nove-
loj kaj poemoj de pola esperantistino). Eldonita de Lina Gabrielli. Formato: 15 cm. × 21 cm. 200 p. Prezo ne montrita.

REGULUS originala romano de Lorjak, eldonita de Lina Gabrielli. La 16-a volumo sub la marko PLEJADO. Formato: 14 cm. × 20 cm. 340 p. Prezo ne montrita.

DON JUAN' TENORIO de Jose Zorrilla, el la hispana tradukita de Luiso Mimo Espinalt. Versa dramo en du partoj kaj sep aktoj. Eldonita de Lina Gabrielli. La 12-a volumo sub la marko PLEJADO. Formato: 14 cm. × 20 cm. 190 p. Prezo ne montrita.

TEMPO kolekto de ĉiuj 66 numeroj de la nomita gazeto represita sur 444 p. kun 30 paĝoj de aldonita enhavtabelo. Formato 30 cm. × 21 cm. Grava materialo por koni la Esperantan aktivadon en Japanio dum la periodo de 1934 ĝis 1940. Ofsete represita kaj eldonita de la Eldona Societo de Nagoya Esp-Societo. Prezo: 9800 enoj. Eldona kvanto: 300 ekz.



Forflugu, nia birdeto!

ANTAŬ nelonge vundita flava birdeto falis en nian klasĉambron, kie iris leciono. Iu kunlernanto ĝin kaptis, kaj tio kaŭzis grandan malordon. La instruisto devis ĉesigi la lecionon. La lernantoj vigle diskutis pri la birdeto. Iu el ni diris: "Ni bredu ĝin, kaj ĝi certe amuzos nin." Alia diris: "Ni liberigu ĝin, ĉar ĝi emas libere flugi en la aero." Tiam la instruisto diris konsile: "Ni bredu ĝin unue kaj liberigu ĝin post kiam ĝi resaniĝos. Ĉu bone?" "Bone," respondis ĉiuj unuvoĉe.

"Kiu bredu ĝin?" demandis la instruisto.

Post diskutado ni komisiis la bredadon al Zhuang Dongmin. Malgranda Zhuang saltis de ĝojo kaj ameme kunportis la birdeton hejmen per ambaŭ manoj. Li tuj faris kaĝon por ĝi. Ĉiutage li donis al ĝi nutraĵon kaj akvon kun zorgemo. La patrino lin riproĉis, ke li atentis nenion krom la birdeto. Zhuang diris: "La taskon donis al mi la instruisto kaj kunlernantoj; mi devas fari ĉiujn klopodojn, por ke ĝi resaniĝu kiel eble plej rapide." Kiam li vidis, ke la birdeto havas bonan apetiton, li sentis grandan ĝojon. Ankaŭ la kunlernantoj ofte venis al lia hejmo por vidi, kiel ĝi fartas.

Post kelkaj tagoj la birdeto tute resaniĝis, sed tio tamen maltrankviligis la geknabojn, ĉar ili sciis, ke ĝi baldaŭ forflugos de ili. En la tago por liberigi ĝin, Zhuang

satigis ĝin kaj portis la kaĝon al la lernejo. Kun granda bedaŭro ni rigardis, ke Zhuang malfermis la kaĝon kaj ĝin ellasis. La birdeto rondflugis kelkfoje super la kapo

de Zhuang kvazaŭ ĝi ne volus forlasi sian savinton, kaj poste ĝi sin direktis for. La geknaboj eksvingis al ĝi siajn manojn kaj kriis: "Forflugu, nia birdeto!"



Flugu, birdeto!

Ilustraĵo de WANG ZHAOHUI

Nova Fizionomio de la Irigacia Sistemo de Jiangsu


Fotoj de XU CHANGJUN

La provinco Jiangsu en orienta Ĉinio havas multajn riverojn. Sed en la malnova socio tiuj riveroj ofte superakvis kampojn kaj vilaĝojn.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, sub la gvidode la popola registaro, la popolo de la provinco faris akvoutiligajn konstruaĵojn, dragis la riverojn kaj arbarizis iliajn bordojn. Dank' al tio progresis la hidroelektra produktado kaj disvolviĝis la industrio kaj agrikulturo de la loko. Iuj konstruaĵoj ludos gravan rolon en konduko de akvo de Jangzi-rivero en nordajn regionojn.



Jen la reordigita Granda Kanalo, ĉe kies bordo staras multaj grentenejoj.




Kluzoj




Fera bovo, kiun oni metis ĉe la bordo de Hongze-lago por regi inundojn



Fiŝbredado



Konstruata pumpstacio



Tikos

SHAO BIN:

Nelacigebla fervorulo — Pri veterana esperantisto Tikos

EN la jaro 1924 mezlernejano, kiu kredis, ke per helpo de la angla lingvo oni povus travojaĝi la tutan mondon, veturis de Ŝanhajo, la plej granda urbo de Ĉinio, al kamparo, kie lia fratino laboris kiel instruistino. Tie li eksciis de ŝi, ke nur Esperanto povas servi kiel lingvo vere taŭga por interkomunikado inter diversaj popoloj. Depost tio la knabo, kiel fidela kaj fervora propagandanto de Esperanto, dediĉis sian tutan energion al la movado kaj eldonis diversajn Esperantajn periodaĵojn unu post alia. Li fine fariĝis esperantisto fama en Ĉinio. Lia nomo estas Tikos.

En 1929 Tikos kaj liaj amikoj fondis la Esperantistan Societon en Hankou kaj eldonis ĝian mimeografitan organon «Hela».

Post nelonge la societo alinomiĝis Esperanta Asocio en Hankou kaj komencis eldoni la stereotipitan organon «La Espero».

«La Espero» aperis ĉiumonate kaj publikigis artikolojn en la ĉina lingvo por disvastigi Esperanton, ĉar tiam ĝiaj junaj fondintoj Tikos, Joĉaŝien, Fu Bin kaj C. Ŝaŭ estis nur komencantoj kaj ankoraŭ ne povis skribi lerte en nia lingvo.

Por larĝigi sian horizonton kaj starigi amikajn kontaktojn kun la ekstera mondo, Tikos kaj liaj samideanoj provis akiri al si diversajn en- kaj eksterlandajn gazetojn per interŝanĝo, tiel ke ili multe informiĝis pri la internacia Esperanto-movado kaj konatiĝis kun multaj esperantistoj.

La 18-an de sept. 1931 la japanaj imperiistoj lanĉis agreŝan militon kontraŭ Ĉinio kaj puŝis la ĉinan popolon en abismon de katastrofo. La Esperanta Asocio en Hankou, kune kun aliaj 20 Esperantaj organizoj en Ĉinio, publikigis deklaron en «La Espero», en kiu ili malkaŝis al la tuta mondo la krimagojn de japanaj imperiistoj, kaj akiris simpatian de diverslandaj popoloj. La deklaro ankaŭ signis kombinon de la ĉina Esperanta movado kun la nacisava movado.

En 1932 Tikos aliĝis al UEA kaj la Proleta Esperantista Unio, poste li organizis la Proletan Esperantistan Ligon en Hankou, kaj pro tio li estis arestita kaj ankaŭ «La Espero» devigite ĉesis eldoniĝi en novembro sam-

jare. Post kiam li liberiĝis kaŭcie, li prenis Jiao Feng kiel sian plumnomon, ĉinigus la artikolon de la fama ĉina poeto kaj verkisto Emi Siao «Pri la Problemo de Latinigo de Ĉina Lingvo» en la sovetunia Esperanta gazeto «La Nova Etapo» kaj publikigis ĝin en la 12-a numero de «Guoji Meiri Wenxuan» de Ŝanhajo, unufoje rekomendante enlande latinigon de ĉinaj ideografiaĵoj. Tio vekis grandan atenton de la tiama ĉina kultura rondo. La Esperanta revuo «La Mondo» kun Ĵelezo kiel sia ĉefredaktoro ekhavis la felietonon «Lingva Scienco» en oktobro samjare por diskuti pri la problemo de amasa lingvo kaj latinigo de ĉinaj ideografiaĵoj. Esperantistoj de diversaj lokoj de Ĉinio unuj post aliaj partoprenis en la movado por nova skriba lingvo, prezentante la sloganon “Ni uzu novan latinigitan skriban lingvon enlande kaj Esperanton eksterlande!” La ĉinaj esperantistoj, kiuj aktive disvastigis Esperanton kaj proponis novan skriban lingvon, ricevis subtenon de la granda ĉina verkisto Lusin.

En marto 1938 Tikos kaj Fu Bin fondis en Hankou «Voĉoj el Oriento» por diskonigi la reziston de la ĉina popolo kontraŭ la japana agreso, kaj en sept. ili translokiĝis al Hongkong kaj daŭrigis la gazeton ĝis ĝia lasta numero en 1940.

«Voĉoj el Oriento» ricevis laŭdon de siaj legantoj per la klara karakterizaĵo de Esperanto kaj nacisava enhavo. Dong Biwu, eminenta ĉina revoluciisto, skribis artikolon por ĝi. Esperantistoj de diversaj lokoj de Ĉinio flegis kaj subtenis ĝin. Kiam ĝi aperadis en Hongkong, ĝi kaj «Orienta Kuriero» kunlabore eldonis la unuan Esperan-

tan version de «Elektitaj Noveloj de Lusin». Inter ĝiaj tradukintoj troviĝis ne nur Tikos, sed ankaŭ la ĉefredaktoro de «Orienta Kuriero», hungara esperantisto Braun, korea esperantisto Elpin kaj ĉinaj esperantistoj Venlo Fon, S. J. Zee kaj Pandiŝo. La libron perfektigis Braun. Ĝi laŭplane estis la unua volumo de «Ĉina Antologio», kiu tamen ne aperis poste pro milito.

En sept. 1939 Tikos foriris de Hongkong al Ŝanhajo. En majo 1949 Ŝanhajo liberiĝis. En la 14-a de julio 65 esperantistoj en Ŝanhajo kunvenis por festi la 62-an datrevenon de la «Unua Libro» de Zamenhof. La kunveno decidis restarigi la Ŝanhajan Esperantistan Ligon. En la 7-a de aŭgusto la ligo kunvokis siajn membrojn kaj en la kunveno Tikos estis elektita kiel konsilanto.

En januaro 1950 Tikos kaj samideanoj de SEL fondis la monatan revuon «Popola Mondo». En 1958 li venis al la redakcio de «El Popola Ĉinio» kaj kune kun Venlo Fon faris lingvan poluradon al ĝiaj artikoloj. En 1959 la «Esperantaj Legajoj kun Komentarioj» kompilita de li aperis en Pekino.

Dum li laboris en la redakcio de EPĈ, li prezentis serion da proponoj kaj faris multajn klopodojn por perfektigi novicojn. Nun la redakcio jam elbakis aron da fakuloj, kies lingva nivelo iom altiĝis. Tio estas nedisigebla de laborado de Tikos.

Tikos estas ne nur eminenta Esperanta tradukisto, sed ankaŭ mentoro de esperantistoj.

S-ro Ĉen Ĉaŭjin, instruisto de parola Esperanto por Tikos, havas profundan impreson pri sia lernanto antaŭ 57 jaroj. Li memoras, ke Tikos havas paron

da grandaj okuloj kaj belan barbon. Li parolas afable kaj laboras obstine kaj senhezite. En siaj primovadaj artikoloj la famaj ĉinaj esperantistoj Ĵelezo kaj Lao Rong menciis lian nomon.

Nemalmultaj junaj esperantistoj en la redakcio de EPĈ kaj en diversaj lokoj de Ĉinio lernas de li lian helpemon kaj metodon altigi Esperantan nivelon. Ili neniam forgesos, kiel li kuraĝigis ilin praktiki la lingvon. Iu aliloka esperantisto skribis al ni, ke Tikos, kiun li antaŭe ne konis, skribis al li kelkdek leterojn por instrui al li Esperanton, donacis al li kelkdek lernomaterialojn kaj poste kuraĝigis lin funkciigi Esperanto-kurson por elementlernejaj instruistoj. Krome, Tikos preparis por li instruan materialon en la daŭro de unu semajno kaj sendis al li sinsekvajn leterojn por doni al li konsilojn pri la kurso. Dank' al lia helpo la kurso ekfunkciis. Alia juna esperantisto rakontis, ke foje Tikos organizis ĉinigi artikolon de Zamenhof kaj petis lin korekti la tradukon. “Ĉar fine vi perfektigos, mi do provos,” la junulo akceptis la peton. Sed Tikos diris: “Ĉiuj estas okupitaj, vi sola perfektigu!” Ŝarĝita de respondeco, la junulo serioze plenumis la laboron. Li bone sin ekzercis kaj altigis sian lingvan nivelon.

Estas nekalkuleblaj la helpoj, kiujn Tikos donis al junaj esperantistoj same kiel laboroj, kiujn li faris por Esperanto dum sia vivo. Kvankam grandaĝa kaj kuŝanta hejme pro malsano, li brilas kiel brulanta kandelo. Samideanoj el diversaj lokoj kaj el la redakcio de EPĈ ofte vizitas lin por daŭre akiri scion de tiu nelacigebla fervorulo.

Esperanto devas esti uzata en sciencoj kaj ĉiutaga vivo

de IO CHOU

La aŭtoro Io Chou estas fama veterana esperantisto, profesoro de la Nord-okcidenta Agronomia Instituto de Ĉinio. Ĉi artikolo publikiĝis en "La Mondo", dumonata gazeto eldonata de la Ĉina Esperanto-Ligo por ĉinaj esperantistoj. Ni tamen opinias, ke ĝi eble interesas niajn eksterlandajn legantojn. Ni do ĝin aperigas en tiu ĉi numero.

La Red.

La frua Esperanto-movado antaŭenmarŝis dank' al la interna ideo de esperantismo, kaj fervoro kaj sindonemo de esperantistoj. Tiam ĝi estis uzata ĉefe


en literaturo kaj arto, paca movado, naciliberiga movado, internacia korespondado kaj filatelado. Sed hodiaŭ en la epoko de sciencoj, epoko de satelito, tiu

ideo kaj fervoreco sola jam ne sufiĉas por disvastigi Esperanton. Nun ni devas uzi Esperanton en sciencoj kaj ĉiutaga vivo.

Mi tre admiras la esperantistojn en diversaj lokoj, ke ili faris grandajn klopodojn kaj kreis viglan situacion de Esperanto en Ĉinio. Kaj mi tamen esperas, ke niaj samideanoj faros solidajn laborojn por nia movado. Frue en la kvindekaj jaroj ni establis Esperanto-studan Asocion en la Nordokcidenta Agronomia Instituto kaj funkciigis Esperanto-kursojn kun pli ol 200 lernantoj, kiuj konsistigis la kvinonon de la totala nombro de la studentoj kaj instruistoj. Sed nun restas el ili nur kvin personoj, kiuj ankoraŭ aktivadas por Esperantomovado. Tio ja estas granda bedaŭro. Same kiel arbokulturo ni devas ne nur flegi arbidojn, sed ankaŭ plenkreskigi ilin.

Nemalmultaj prezentas al ni demandojn: Por kio ni lernas Esperanton? Ĉu aĉetebblas E-libroj? Ĉu ĝi povas havigi al ni vivrimedon kaj profesion? En decembro pasintjare la Eduka Ministrejo de nia lando refoje sciigis, ke Esperanto povas esti instruata kiel unu el la nedevi-

Io Chou kaj lia edzino Lu Jing (esperantistino)





Io Chou

gaj fremdaj lingvoj en altlernejoj, kaj ĝi povas funkcii kiel unu el la oficialaj ekzamenaj objektoj por diplomi studentojn, promocii funkciulojn kaj varbi esploranto-studentojn. Ja ĝojiga afero! Mi sincere salutas la koncernajn gvidantojn de la Eduka Ministrejo! Ni devas multe klopodi por solvi la supremenciitajn problemojn.

Ni devas laŭplane lernigi al diversaj fakuloj Esperanton kaj pere de ili disvastigi Esperanton en ĉiuj fakoj. Antaŭ ĉio ni devas enkonduki Esperanton en la turismajn servojn de nia lando. Tiuflanke ni faris tre malmulte kompare kun iuj landoj de Eŭropo kaj Latin-Ameriko. Due, ni devas enkonduki Esperanton en la natursciencojn, ĝuste kiel nun faras eŭropaj esperantistoj.

Lerninte Esperanton, oni povas ricevi helpon de lokaj esperantistoj dum ilia vojaĝo ekster-

lande. Antaŭ kelkdek jaroj jam troviĝis en iuj landoj kondukto-roj, kelnero kaj gvidistoj, kiuj parolis Esperante. Sed ĝis nun ni faris malmulton en tio. Se ni tiel faros, ni povos altiri ĉiam pli multajn esperantistojn al Ĉinio kaj pliprofundigi la amikecon inter la diverslandaj popoloj. Krome tio ankaŭ antaŭenpuŝos la Esperanto-movadon en Ĉinio kaj en la tuta mondo.

Uzi Esperanton en la sciencaj kampoj estas tendenco de la nuna internacia E-movado. Pasintjare, ĉe la 67-a Universala Kongreso en Belgio vigle aktivadis natursciencistoj. Tiuflanke ni ĉinaj esperantistoj devas iri en la unua vico. Ĉinio estas unu el la landoj de la Tria Mondo, kaj ĝi ne havas ambicion trudi sian lingvon kiel internacian lingvon. Ni oponas kontraŭ la lingva hegemonio de ĉiu ajn potenco. Ni esperas, ke ĉiu esperantisto proponos Esperanton

kiel laborlingvon en internaciaj akademaj kunvenoj kaj publikigos Esperantajn traktatojn plejnajn aŭ mallongigitajn en sciencaj revuoj.

Krome, ni devas pli multe skribi en Esperanto raportojn pri sciencaj aktivadoj, popularajn sciencajn artikolojn kaj eĉ fakajn verkojn. Eble iuj konservativuloj opinias tion malortodoksa. Ili diras, ke sciencaj traktatoj devas esti verkitaj en la angla lingvo. Se oni verkus ilin Esperante, laŭ ilia vidpunkto, ilin ne komprenus granda parto de angloj kaj usonanoj. Sed, rigardate de la tuta mondo, ilin komprenas eble pli multaj aŭ ĉiam plimultiĝantaj homoj. Eĉ se miaj verkoj trovus malmulte da legantoj pro tio, mi volonte tion farus. Mi pensas: Se traktato estas vere altkvalita kaj valora, do diverslandaj sciencistoj, kiuj ne komprenas Esperanton, certe ĉiamaniere klopodas por povi legi ĝin aŭ tradukigi ĝin. Ankaŭ la esperantistoj de diversaj landoj tradukos ilin en sian nacian lingvon.

Nun en Ĉinio funkcias multaj Esp-kursoj kaj kelkaj korespondaj lernejoj. Sed mi aparte esperas, ke la Centra Televida Stacio malfermos televidan Esp-kurson por plivastigi Esperanton kaj faciligi lernadon de tiuj kiuj volas ĝin lerni hejme. Tia moderna rimedo ŝparigos al la lernantoj tempon kaj monon, kaj donos al ili ĝustan prononcon. Mi proponas, ke la Ĉina Esperanto-Ligo kaj "Amikoj de Esperanto" interkonsiliĝu kun la Centra Televida Stacio pri tiu afero.

Se ni sukcesos en tio, la Esperanto-movado en Ĉinio certe havos novan perspektivon kaj forte influos la mondan Esp-movadon.



Doktorino Xu Gongqiao

WANG SONG:

La unua doktorino kulturita de Ĉinio mem

EN majo ĉi-jare publikiĝis informo, ke 18 ĉinoj estis honoritaj per diplomo de doktoreco. Ili estas la unuaj doktoroj kulturitaj de Ĉinio mem post starigo de ranga sistemo en la lastaj jaroj. Inter ili troviĝas unu sola virino nomata Xu Gongqiao. Antaŭ nelonge mi intervjuis ŝin en iu ordinara laboratorio de Biofizika Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj situanta en la okcidenta antaŭurbo de Pekino. Ŝi jam havas 40 jarojn, tamen aspektas ankoraŭ tre juna kun svelta staturo. Sur ŝia hele ruĝeta vizaĝo paro da okuloj radias saĝecon.

Mi petis Xu Gongqiao rakonti kiel ŝi fariĝis doktorino. Ŝi diris, ke en 1965 ŝi estis diplomita el la biologia fakultato de Fudan-universitato en Sanhajo kaj en 1978 fariĝis esplorantostudento de Biofizika Instituto sub la Ĉina Akademio de Scien-

coj post ekzameno. Ŝia instruisto Zou Chenglu estas vicedirektoro kaj esploristo de la nomita instituto. Sub la gvido de la instruisto kaj helpo de kolegoj de la instituto, ŝi faris esploron pri la strukturo kaj funkcioj de fermento, uzante NAD-derivaĵojn kiel sondilon. Post foliumo de granda kvanto da scienca-teknika literaturo kaj multaj eksperimentadoj, ŝi skribis disertacion, en kiu ŝi elmetis novajn opiniojn. En la 23-a de novembro, 1982 okazis ŝia respondo por ŝia doktoreca disertacio kaj la prijuĝa komitato konsistanta el sep ĉinaj famaj biologoj unuanime opiniis, ke ŝi relative bone mastris la fakan literaturon, ŝia eksperimenta projekto estas strikta, la donitaĵoj fidindaj kaj la esploraj fruktoj abundaj, krome ŝi prezentis donitaĵojn kun nova signifo pri la kataliza rolo kaj reguliga me-

kanismo de fermento. Per sekreta balotado la juĝistaro unuanime opiniis, ke ŝia disertacio atingis la normon de doktoreco. En la 6-a de januaro ĉi-jare, la rango-prijuĝa komitato de la Biologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj oficiale donis al ŝi titolon de doktoro.

Dum preparado de la disertacio Xu Gongqiao renkontis nemalmultajn malfacilojn. Ekzemple, por fari iun eksperimenton ŝi bezonis enzimon, ŝi mem elrafinis enzimon laŭ jam mastritaj procedoj, sed ŝi malsukcesis kvarfoje. Ŝi detale ekzamenis la procedojn unu post alia kaj ne trovis eraron. Kie estas la problemoj? Kuŝante en la lito nokte, ŝi ankoraŭ cerbumadis pri tiu problemoj. Subite ŝi ekpensis, ke iu aparato estas farita de ŝi mem, eble la kaŭzo kuŝas ĝuste en ĝi. Frumatene de la sekvanta tago, ŝi rapidis al la laboratorio



Xu Gongqiao kaj ŝia instruisto Zou Chenglu

por kontroli la aparaton. Ho! ĝuste kiel ŝi pensis, unu horizontala tubeto de la aparato estas iom tro dika, sekve la fluidaĵo en ĝi fluas tro rapide. Pro tiu malgranda tubeto ŝi perdis tempon de unu plena monato.

Venkinte multajn malfacilojn, Xu Gongqiao faris reviziojn al la esploroj de la antaŭuloj, dume ŝi trovis, ke la kvar subradikaloj de fermento-molekulo havas diferencon inter si en siaj funkcioj, la diferenco ekzistas ne nur inter la paroj, sed ankaŭ inter la du subradikaloj de unu sama paro. Wang Yinglai, fama kemiisto kaj direktoro de la Ŝanhaja Filio de la Ĉina Akademio de Sciencoj, montris: "Tiuj trovoj estas relative valoraj." Zou Chenglu diris: "Ŝia disertacio estas en doktoreca nivelo en altlernejoj de ĉiu ajn lando. Xu Gongqiao ŝuldas sian sukceson ĉefe al sia propra penado."

Xu Gongqiao tamen opinias, ke ŝia esplora atingo estas akirita sub la direktado de ŝia instruisto Zou Chenglu kaj helpo de la kolegoj de la fermento-esplora kabineto kaj pro tio ŝi kore dankas ilin. Ŝin ĉiam regas forta emociigo, kiam ŝi parolas pri la instruisto. Zou Chenglu estas fama biofizikisto de Ĉinio kaj ankaŭ pacienca kaj lerta instruisto. La esplorata objekto de Xu Gongqiao — fluoreska koenzimo-derivajo — estas trovita de Zou Chenglu kaj liaj kolegoj en la jaro 1975, kaj tio siatempe vekis altan takson ĉe la internacia biologia rondo. Zou Chenglu senrezerve gvidis Xu Gongqiao por fari pluapaŝan esploron pri ĝi. Xu Gongqiao diris, ke s-ro Zou Chenglu verŝis grandan energion por sukcesigi ŝian disertacion. Eĉ dum sia prelegado eksterlande, li ofte skribis al ŝi por doni ĝustatem-

pan direktadon kaj helpon. Legante tiujn leterojn el la malproksimo, Xu Gongqiao sentis grandan dankemon kaj altan respekton al sia instruisto.

En universitato Xu Gongqiao studis biologion, sed ŝi elektis molekulo-biologion sia esplora objekto. Ĝi ampleksas biologion kaj fizikemion. Iujn eksperimentajn aparatojn ŝi neniam uzis, do kamaradoj de la fermento-esplora kabineto fervore helpis ŝin, klarigante kiel ilin uzi. Kiam aperis perturbo ĉe la aparatoj, oni ĝustatempe ilin reordigis. Kiam aparatoj ne sufiĉis, oni ĉiam cedis ilin al Xu Gongqiao, por ke ŝi la unua faru eksperimenton . . . Parolante pri tiuj pasintajoj Xu Gongqiao ne povas sin kvietigi de forta ekscitigo. Ŝi diris: "Min favoras la nova epoko."

Jes, Xu Gongqiao prave diris. Ŝi renkontis la favoran tempon,

kiam Ĉinio emfazas disvolvon de sciencoj kaj kulturon de kompetentuloj. Por kulturi grandan nombron da diversaj altklasaj fakuloj Ĉinio starigis en 1980 rangon sistemon. Nun jam unuapaŝe formiĝis regularo por kulturo de fakuloj kun nivelo pli alta ol tiu de altlernejaj diplomitoj. Pli ol sescent unuoj en la tuta lando plenumas la laboron kulturi esplorantojn-studentojn. En tiuj unuoj pli ol dudek mil studentoj klopodas por magistriĝi sin kaj ĉ. mil studentoj strebas por fariĝi doktoroj. En la lastaj du jaroj, tricent dudek mil el la tricent kvindek mil altlernejaj diplomitoj de la tuta lando ricevis diplomon pri licencio kaj proksimume dekkvin mil akiris la rangon de magistro.

La nova epoko ebligis al Xu Gongqiao plene disvolvi sian talenton. Tamen, ŝia doktoriĝo estas nedisigebla de ŝia diligenteco. Instruisto Zou Chenglu iam demandis ŝin, ĉu ŝi volonte dediĉos sian tutan vivon al la scienca afero kaj ne retiriĝos antaŭ ĉia ajn malfacilo?

Xu Gongqiao senhezite respondis: "De la infanaĝo mi ŝatas esplori problemojn ĝis plena kompreno, kaj tiu mia sinteno neniam ŝanĝiĝos estontece!" Ŝia studemo montriĝis jam antaŭ tridek jaroj, kiam ŝi ankoraŭ lernis en la kvina klaso de elementa lernejo. En ŝia hejmo estis malgranda korto kun malpli ol dek kvadrataj metroj. En la korto ŝi kaj ŝia frato kulturis lufojn, rozojn kaj konvolvulojn. Ŝi ne nur akvumadis kaj sterkadis ilin, sed ankaŭ legis hortikulturajn librojn por scii, kial la lufoj kaj konvolvuloj povas rampi supren, kaj kial la rozo havas tiel multajn speciojn. Ŝi kuraĝe greftis rozujon por elkulturi novan specion.

En mezlernejo ŝiaj lerno-pojntoj ne estis tre altaj, tamen ŝi emis memstare pripensi, ne blinde sekvis aliajn kaj neniam kaŝis kion ŝi ne komprenis. Krom lerno-libroj, ŝi plej ŝatis astronomiajn kaj biologiajn legaĵojn. Ĉiujn vintrajn feriojn ŝi pasigis en biblioteko situanta kontraŭ ŝia hejmo.

Poste ŝi sukcese trapasis eniran ekzamenon por la biologia fakultato de Fudan-universitato kaj tiel antaŭ ŝi malfermiĝis mondo atendanta ŝian esploron. Fine ŝi estis sorĉita de genetiko kaj elektis la temon "Mikrobiologia genetiko" por sia diplomitaĝa disertacio. Xu Gongqiao neiel povas forgesi sian instruiston profesoron Sheng Zujia de

la biologia fakultato. Sub lia rigora trejnado ŝi al kutimiĝis al severa sinteno en studo. Por skribi la disertacion ŝi faris kelkcent eksperimentojn en du kaj duona jaroj kaj plenigis sep dikajn kajerojn per notoj pri centoj da eksperimentoj. Ŝi faris ripetadajn eksperimentojn kaj ekzamenojn pri ĉiu argumento de sia disertacio. Por ĉio ĉi ŝi laboris preskaŭ en ĉiuj festoj kaj ferioj.

"Nur strebado kaj diligenteco povas konduki al sukceso de la afero." Jen persona kono de Xu Gongqiao. Ŝi modeste diris al mi: "Kvankam mi akiris doktorecon, tamen ankoraŭ mankas al mi scioj en multaj flankoj. Mi alfrontas ŝvitigan lernadon."

Xu Gongqiao en laboratorio



DALI — Antikva Urbo sur Altebenajo

de LAO BAI

DALI-GUBERNIO situas en la Dali-a Baj-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de Yunnan-provinco ĉe la sudokcidenta landlimo. Ĝi limtuŝas la monton Cangshan en la okcidento kaj najbaras al la lago Erhai en la oriento, estas tre antikva urbo sur la Yunnan-Guizhou-a Altebenajo.

Frue antaŭ pli ol 3 000 jaroj, la prapatroj de la naciecoj Baj kaj Ji vivis, laboris kaj generis tie. En la jaro 109 a. K., la imperiestro Wudi de Han-dinastio instalas tie Yeyu-gubernion (la nuna Dali). La regno Nanzhao en Tang-dinastio (618-907 p. K.) kaj la regno Dali en Song-dinastio (960-1279 p. K.) starigis ĉe ĝi ĉefurbon. Ĝi tiam estis la centro de Yunnan-regiono en politiko, ekonomio kaj kulturo.

MULTAJ HISTORIAJ OBJEKTOJ KAJ LOKOJ

Antaŭ ĉ. 1 300 jaroj, ĉirkaŭ la lago Erhai aperis ses kompare grandaj triboj, kies estroj nomiĝis "zhao" (zhao signifas "reĝon" en la ji-nacieca lingvo), kaj la plej suda nomiĝis Nanzhao. En la jaro 737 p. K., la reĝo Piluoge de Nanzhao, subtenata de Tang-dinastio, konkeris la aliajn kvin zhao-ojn, unuigis Erhai-regionon kaj fondis la ĉef-

urbon de Nanzhao en la nuna Taihe-vilaĝo tri kilometrojn for de Dali. La regno Nanzhao daŭris 165 jarojn. Post la pereado de Nanzhao, baj-nacieca oficisto Duan Siping fondis Dali-regnon en 937 p. K. kaj prenis la nunan urbon Yangjumie najbaran al Dali kiel sian ĉefurbon. La regno ekzistis 315 jarojn kaj estis pereigita de mongolo Kublajo en 1252 p. K. De tiam la politika, ekonomia kaj kultura centro de la regiono Yunnan transiĝis al Kunming, la nuna ĉefurbo de Yunnan-provinco. Nun ĉirkaŭ la lago Erhai ankoraŭ troviĝas neolitikaj ruinoj kaj historiaj objektoj kaj lokoj de la periodoj Nanzhao kaj Dali.

Xiaguan, la ĉefurbo de la Baj-nacieca Aŭtonoma Subprovinco sudoriente de Dali je dek kilometroj, estis Longweiguan en Nanzhao-periodo, ĝi kaj la norda Longshouguan ambaŭ estis gravaj trapasejoj por gardi la urbon Dali. Nun ĝi estas grava urbo kun 100 000 loĝantoj. Survoje de Xiaguan ĝis Dali, oni ankoraŭ povas vidi ruinojn de antikvaj urbomuroj ĉe la piedo de Cangshan-monto. Ĉe la vilaĝo Taihe troviĝas steleo, la plej granda kaj plej antikva en Yunnan, antaŭ pli ol 1 200 jaroj. Ĝi registris interrilaton inter la regno Nanzhao kaj Tang-dinastio.

Surstrate de Dali oni povas vidi tri blankajn pagodojn en la nordo konstruitajn en la periodo de Nanzhao. La ĉefa pagodo el ili estas alta je 69.13 metroj, 16-etaĝa kvadrata pagodo el brikoj. Ĝi prezentas tipan formon de pagodoj de Tang-dinastio. La aliaj du pagodoj altaj respektive je 42.19 metroj sude kaj norde de ĝi estas 10-etaĝaj ok-angulaj pagodoj el brikoj. La pagoda arkitekturo estis enkondukita el Hindio kune kun budhismo. Poste ĝi sorbis antikvan pavilonan arkitekturon de Ĉinio kaj iom post iom evoluis en arkitekturan formon kun etaĝa kaj pavilona stilo. La pagodo, ŝtonkaverno kaj fresko en Ĉinio estis nomataj tri budhismaj artoj. Historiaj literaturoj diris, ke por konstrui la tri pagodojn oni koncentris la famajn lokajn konstruistojn, kaj krome la kortego de Tang-dinastio sendis tien talentajn arkitektojn por doni helpon en la projektado kaj konstruado. La konstruado daŭris pli ol 20 jarojn. En la pasintaj pli ol mil jaroj, la tri pagodoj spertis erozion kaj plurajn fortajn tertremojn, sed ili sendifekte staras apud la lago Erhai kaj la monto Cangshan.

Se oni iras de tie norden 120 kilometrojn, oni atingas la gubernion Jianchuan. Plu irinte

laŭ ŝtona vojeto, oni atingas la ŝtonkavernaron de Shizhong-monto en vasta arbaro, kiu inkluzivas 16 kavernojn en tri lokoj. Ili estas restaĵoj de Nanzhao kaj Dali. En la ŝtonkavernoj troviĝas ĉefe ŝtonaj budhoj en belaj formoj kun fluaj linioj. Ili estis kreitaj de artistoj, kiuj rompis la katenon de religio kaj prenis la realan vivon kiel la bazon. Krom la budhaj statuoj, troviĝas statuoj de reĝoj de Nanzhao en du kavernoj, el kiuj unu prezentas inspektadon de reĝo Geluofeng de Nanzhao kaj la alia prezentas la sesan reĝon Yimouxun de Nanzhao kaj liajn sekvantojn. La du reĝoj ludis gravan rolon en disvolvo de la ekonomio kaj kulturo de Nanzhao kaj la amika interrilato inter Nanzhao kaj han-nacieco. La statuoj karakteriziĝas per krudaj linioj kaj fortaj temperamentoj, iliaj vestaĵoj kaj ceremonio havas densan lokan guston kaj originalan naciecan stilon. Krome, en la kavernoj troviĝas ankaŭ malmultaj statuoj de persoj kaj hindoj, kio spegulis la amikan interrilaton inter Ĉinio kaj ĝiaj najbaraj landoj.

Sur krutaj rokoj de la monto Shizhong konstruiĝis temploj ombrataj de gigantaj arboj. En printempo kaj somero, kiam floras ĉie kamelioj kaj rododendroj, baj-naciecaj vilaĝanoj svarmas en la arbarojn por ekskursi kaj kanti. Tio estas tradicia kunveno kaj ankaŭ bona ŝanco por gejunuloj en elektado de amat(in)o.

La nuna gubernia urbo Dali konstruita en la jaro 1368 p. K. estas malpli granda ol la teritorio de la antikva Dali-regno kaj inkluzivas nur Taihe-vilaĝon kaj Yangjumie-urbon. La stratetoj ŝtone pavimitaj, ŝtonaj muroj, maljunaj arboj, riveretoj ĉirkaŭ-



La Avalokitesvara Pavilono en Dali, konstruita de baj-oj en la 8-a jarcento

fluantaj la domojn, ĉio impresis vizitantojn per antikveco, graciaeco kaj kvieteco. La Dali-anoj ŝatas florojn. Ĉiun printempon, kiam plene disvolviĝas kamelio, la Dali-anoj okazigas floro-foiron. Ĉiu familio elmetas siajn kameliojn antaŭ la domon, kio pli ĉarmigas printempon. Ankaŭ la tradiciaj festoj kiaj “Marta Strato”, “Papilia Kunveno” kaj “Torĉa Festo” riĉas je nacieca gusto.

UNIKAJ PEJZAĜOJ

Dali-regiono estas nomata de iuj fremdlandaj turistoj kiel “Svisio de Oriento”, ĉar ĝi havas

la majestan monton Cangshan okcidente kaj la ĉarman lagon Erhai oriente, inter Cangshan kaj Erhai etendiĝas vasta ebenaĵo kun milda klimato.

La monto Cangshan etendiĝanta 50 km. estas branĉo de la montaro Hengduan, etendaĵo de la montaro Himalajo. Faulto de stratumo ambaŭflanke de Cangshan formis 19 montpintojn kaj 18 riveretojn, el kiuj ĉiu havas sian apartan ĉarmecon. Sur la montpintoj Malong kaj Yuju altaj je 4 000 metroj super la marnivelo ankoraŭ konserviĝas piramidaj pintoj eroziitaj de antikvaj glaciriveroj, glaciaj ka-

vernoj kaj lagoj formitaj pro degelado de glaciriveroj. La krukregaj rokmuroj de valoj kvazaŭ skrapus la ĉielon, la falakvoj verŝiĝas inter montoj kaj fine enfluas en la lagon Erhai. Montotalie kreskas pinoj, piceoj, sabinoj kaj kaŝtanoj, kaj la loko fariĝis grava botanika trezorejo en la sudokcidenta parto de Ĉinio. Montpiede kreskas tearboj, palmoj, diversaj drogherboj kaj floroj, kaj la loko estas grava produkto de tri famaj ĉinaj floroj kamelio, rododendro kaj primolo.


La nuboj super la monto Cangshan ŝanĝiĝas mirige: Ili similas jen al maldensa fumo, jen al fulgo. La plej kuriozaj estas "rubanda nuboj" kaj "edzoatendanta nuboj". En somero kaj aŭtuno, sur la blua ĉielo ofte staras tuttage blanka rubanda nuboj, kvazaŭ zonanta la monton ĉe la talio. Tio estas

aparta vidindaĵo de Cangshan por turistoj. Oni diras, ke ĝi aŭguras riĉan rikolton. Kaj en vintro kaj printempo, super la monto Cangshan ofte aperas unu sola blanka nubojpeco, kiu ŝvebas jen supren jen malsupren. En palpebrumo malaperas la blanka nuboj kaj tuj ekventegas super la lago Erhai. Oni diras, ke la blanka nuboj estas princino de Nanzhao, ke ŝi volas blovsekigi la lagon por vidigi la amaton dronigitan al la fundo. Tial oni nomas la nuboj "edzoatendanta nuboj". La bela legendo plimisterigas la mirindan naturan pejzaĝon.

La lago Erhai formiĝis pro altebenaja faŭlto en la fino de la glacirivera epoko. Ĝi longas je 40 km., larĝas je 3-9 km., profundas je 22 metroj kaj havas orelan formon.

En pratempo maro finiĝis ĉe la talio de la monto Cangshan,

kaj la praavoj loĝis sur la montodeklivoj. Ili vivis troglodite uzante ceramikojn kaj lunar-kan ŝtonan tranĉilon. Post multaj kaj multaj jaroj la naturo ŝanĝis Erhai-regionon en la nunan vastan fekundan ebenajon kun diversaj produktaĵoj kaj belaj pejzaĝoj. En la klara kaj verda lago sin trovas la insulo Ora Navedo alta je 250 metroj. La reĝo de Nanzhao siatempe konstruigis tie someran palacon, eĉ nun oni ankoraŭ povas trovi tie ruinon de la palaco. Dek kilometrojn for de la insulo granda roko kun la pavilono de Avalokitesvaro staras en la lago. La monto Tuanshan sur la suda bordo de la lago estis antikva cervo-bredejo kaj ĉasejo, kaj nun fariĝis parko Erhai. Kiam la suno subiras en la okcidento, oni povas vidi de sur la monto la tri pagodojn kaj iliajn ombrojn en la lago. Tio estas alia rava pejzaĝo.



La Papilia Kiosko en la parko "Papilia Fonto"




Cangshan-monto kaj Erhai-lago

Printempo ĉe la montpiedo

Fotoj de LAO BAI

Cangshan-monto kaj Erhai-lago





La insulo Putuo en la lago



Pitoreskejo apud la lago


FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

Jugoslava knabineto

de DUŠAN ADNADJ (Jugoslavio)



Komputero kaj la ĉina medicino



Resumo de la praktika sperto de Zhu Renkang per komputero

EN la lastaj jaroj Ĉinio akiris ĝojigajn sukcesojn en resumado de klinikaj spertoj de famaj kuracistoj de la ĉina medicino per komputera tekniko. Tion bone servas kiel ekzemplo la “Sistemo ZRK-82 de Zhu Renkang, specialisto de la ĉina medicino” ekspertizita en Pekino ĉi-printempe.

Zhu Renkang, 75-jara, estas fama kuracisto pri ekzemo kaj dermito, kaj la efikeco de lia kuraco atingis 94.9%. Ekzemo kaj dermito estas oftaj kaj ripetigemaj haŭtmalsanoj, kaj la suferantoj estas longe turmentataj de jukado, ulcero kaj eksudo kaj malfacile resanigeblaj. Sed Zhu Renkang povas doni tre efikan kuracon al tiaj malsanoj.

Por resumi la klinikajn spertojn de Zhu Renkang, la Akademio de la Ĉina Medicino kaj Jilin-universitato faris esploradojn utiligante komputeron kaj teorion kaj teknikon de alta inteligento, kaj elfaris elektronikan diagnozan sistemon por ans-

tataŭi kuraciston en ekzameno al malsanulo.

Lernante la tutan proceson de la pensado de Zhu Renkang en kuraco de ekzemo kaj dermito, la elektronika sistemo dividis lian pensadon en kvin stadiojn de malsamaj gradoj formante multtavolan rezonadan retaron. Cetere, laŭ la teorio kaj spertoj de Zhu Renkang, la sistemo dividas ekzemon kaj dermiton en 10 sindromojn. Ricevinte la informojn pri la simptomoj de malsanulo, la sistemo tuj faras similan “pensadon”, identigas la sindromon de la malsano kaj faras diagnozon kaj donas recepton. Ĉu en diagnozo aŭ en kuracado, la sistemo povas fari preskaŭ tute simile kiel kuracisto Zhu Renkang.

Pli mirinda estas tio, ke la elektronika sistemo povas ne nur fari diagnozon kaj prognozon, sed ankaŭ montri per ideogramo la proceson de la diagnozado, kvazaŭ kuracisto Zhu Renkang mem respondus al la pacientoj. La sistemo multe faciligas la lernadon de studentoj

ĉe Zhu Renkang. La elektronika sistemo povas akcepti kaj malsanulon unuafoje vizitantan, kaj malsanulon malnovan, faras por ili prognozon kaj poste decidas je konvena metodo de traktado.

Taksante la rolon kaj signifon de la elektronika sistemo, oni venas al tia konkludo, ke ĝi rezervas por la posteuloj la kompletajn spertojn de Zhu Renkang pri kuracado de ekzemo kaj dermito, kaj ĉe kliniko ĝi povas doni al pli da pacientoj kuracon de nivelo de eminenta kuracisto. Dum laboro la sistemo tenas altan stabilecon kaj fidindecon, ĉiam traktas pacientojn laŭ la ĝusta pensado de Zhu Renkang kaj ne estas influata de hazarda faktoro, kiel kuracisto de laciĝo aŭ humoro. Kaj cetere ĝi indikas per la ĉina ideogramo malsanan historion kaj recepton, kio estas tute necesa kaj tre oportuna por la ĉina medicino en diagnozado kaj kuracado. La alta efikeco pruviĝis per tio, ke ĝi donas recepton nur en 4-5 minutoj post ricevo de informoj pri la malsano de la paciento.

La ĉina antikva filozofio (1)

LA filozofio de Ĉinio burĝonis frue en la dinastioj Shang kaj Zhou (la 17-a jc. a. K. — la 7-a jc. a.K.) en la sklava socio. Tiam oni ekpensis jam pri la universo. Dum tiu periodo la religia mondkoncepto okupis la regantan pozicion en la ideologio.

En Shang-dinastio estiĝis la koncepto pri superhoma estaĵo, la personigita superega dio havanta absolutan aŭtoritaton, tial antaŭ ol fari militon, konstruigi urbomuron k. a., la reĝoj de Shang-dinastio ĉiam petis konsilojn de la superhoma estaĵo pere de aŭguristoj. En Zhou-dinastio oni nomis la superegan dion “ĉielo” kaj rigardis ĝian volon la plej alta. Ankaŭ la regantoj de tiu dinastio faris aŭguradon por antaŭvidi feliĉon kaj malfeliĉon. Ili diris, ke la ĉiela volo senkreditigis la krue-lan reĝon de Shang kaj anstataŭigis lin per la reĝo de Zhou pro ties virto.

Sur la bazo de longa socia praktiko de la homoj, ankaŭ rudimento de materiismo kaj dialektiko kontraŭa al la superhoma estaĵo kaj ĉiela volo burĝonis, kiel al ni montras “Ĝou Ĵi”, “Ŝang Ŝu” kaj aliaj verkoj. “Ĝou Ĵi”, libro por aŭgurado, prezentis la negativan kaj pozitivan signojn (—kaj - -), kiuj povas formi ok diagramojn (ekz. ☰, ☷ k.a.) simbolantajn ĉielon, teron, venton, tondron, akvon, fajron, monton kaj lagon. Jen

teorio de primitiva kaj rudimenta materiismo pri la konsisto de la universo. En la libro oni povas legi ankaŭ tre riĉajn ideojn de rudimenta dialektiko, ekz. kontraŭstaro de kontraŭdiroj, iom-post-ioma ŝanĝiĝo, ekŝanĝiĝo en malgranda skalo kaj turniĝo de afero en ĝian malon. “Ŝang Ŝu”, kolekto de ĉinaj antikvaj historiaj dokumentoj, diras, ke akvo, fajro, ligno, metalo kaj tero estas la elementoj konsistigantaj la universon.

La periodo de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj (770 a.K. — 221 a.K.) estis periodo en kiu la ĉina socio transiris de la sklava sistemo al la feŭda. Pro la granda ŝanĝiĝo de la socio senprecedence vigliĝis diversaj skoloj de ideologio, kaj la filozofio de Ĉinio eniris en sian maturan periodon, liberiĝis el la religia sfero kaj fariĝis sendependa ideologio. Tiam aperis famaj skoloj de taoistoj, konfuceanoj, mozianoj, legalizistoj kaj eklektikuloj.

Laozi (ĉ. la 6-a jc. a. K.) en la posta periodo de Printempo kaj Aŭtuno estis fondinto de taoismo. La plej esenca punkto de lia filozofio konsistas en “tao” (vorto signifanta vojon). Li opiniis, ke “tao” estas la origino de la universo kaj ankaŭ la kaŭzo kaj leĝo de ĝia ŝanĝiĝo. “Tao” karakteriziĝas per tio, ke ĝi estiĝis pli frue ol la ĉielo kaj la tero kaj ekzistas ekster la universo, cirkulante sen sono



Laozi

kaj formo. Ĝi lasas ĉion prenisian naturan direkton, kaj ĉio kreiĝas el ĝi. Lia “tao” estas spirita substanco. Li diris: “Ĉio en la mondo kreiĝis el io kaj io el nenio.” Klare, “tao” per si mem signifas “nenion”. Li diris ankaŭ, ke domo taŭgas por loĝado pro malpleneco en la interno kaj argila poto povas servi kiel ujo pro sia interna malpleno. Li konkludis, ke ĉia “esto” povas ludi sian rolon nur en kombino kun “neesto”. Tre fama estas lia diro, ke “feliĉo sin apogas sur malfeliĉo kaj en malfeliĉo sin kaŝas feliĉo.” Ili ne estas absolute kontraŭaj, sed povas turniĝi unu en la alian. La diro montris lian dialektikan ideologion. Li vidis la transformiĝon de la aferoj kaj ne metafizike observis problemojn, kaj tio ja estis tre valora en la tiama socio, tamen Laozi ankoraŭ ne konsciis, ke la transformiĝo de la aferoj eblas nur sub certaj kondiĉoj. Tial li rigardis ĉiujn

aferojn kapricaj, sekve lia dialektika ideologio portis negativan karakteron. Li prezentis la politikan proponon “regi sen (kontraŭnatura) faro”. Li diris, ke administrado de granda lando similas al kuro de malgrandaj fiŝoj. Se oni nur traktas ilin “sen (kontraŭnatura) faro”, t.e., ne turnas ilin, oni povas sukcesi en tio.



Konfuceo

Konfuceo (551 a. K. — 479 a.K.) en la lastaj jaroj de la periodo de Printempo kaj Aŭtuno estis la fondinto de konfuceanismo. Dum sia tuta vivo li kulturis 3 000 disĉiplojn, el kiuj 72 fariĝis eminentuloj. Li kredis la ĉielan volon. Li havis konservativan politikan sintenon kaj defendis la malnovan soci-sistemon, tamen ankaŭ aprobis iujn reformojn. La kerno de lia ideologia sistemo estis “humaneco”, kies malnova senco estas: la rigardo, aŭskulto, parolo kaj ago de homo devas konformi al la etiketo de Zhou-dinastio (patriarka klana sistemo); kaj kies nova senco aldonita de li estas ami aliajn: “Sukcesigu aliajn antaŭ ol sukcesigi vin, prosperigu aliajn antaŭ ol prosperigi vin.” “Ne faru al la aliaj kion vi mem ne volas.” Unuvorte, ami aliajn signifas trakti

aliajn kiel sin mem. La nova enhavo de Konfuceo pri “humaneco” spegulis emancipiĝon de la sklavoj, altiĝon de la valoro de la popolanoj kaj profundiĝon de la kono pri la homaj rilatoj en la periodo de la socia transformiĝo.

Pri la konado Konfuceo diris, ke oni konas ion sen lerno aŭ per lerno, sed li pli multe parolis pri kono per lerno. Kun materiisma sinteno al konado li emfazis, ke “kono estas kono, nekono estas nekono”. Li diris, ke oni devas senlace serĉi veron ĝis la lasta spiro kaj oni ne bedaŭras morton en vespero, se oni aŭdas la veron en mateno.

Liaj pensoj karakteriziĝis per sekvo de la rutino en unu flanko kaj espero pri reformo en la alia. Tio decidis la “mezecon” en sia metodologio. Li prenis la mezajn vojon inter la du ekstremoj. Laŭ liaj vortoj “mezeco” signifas, ke oni devas fari nek tro, nek nesufiĉe.

Post la morto de Konfuceo la ĉina filozofio eniris sian floran periodon, en kiu aperis tre diversaj skoloj. Inter la plej famaj filozofoj troviĝis Mengzi kaj Zhuangzi.

Mengzi (372 a.K. — 289 a.K.), reprezentanto de la dekstraj konfuceanoj, heredis kaj disvolvis la ideon de ĉiela volo. Li kredis, ke la ĉielo havas volon kaj moralecon, kaj propagandis “kombinon de la ĉielo kaj la homo”. Li estis aktiva iniciatinto de la tezo, ke “homo naskiĝis bonkora.” Li disvolvis la ideon de Konfuceo pri “humaneco”, elmetis la tezon de “humana politiko” kaj petis la regantojn praktiki humanan politikon al la popolo. Li havis certajn demokratiajn ideojn. Li asertis, ke “la popolo estas la plej valora,



Mengzi

la ŝtato malpli kaj la monarko malplej”. Kiel granda aprobanto de la feŭda sistemo, li rigardis tute prava la feŭdisman vidpunkton, ke “tiuj, kiuj laboras per sia cerbo, regas, kaj tiuj, kiuj laboras per sia fizika forto, estas regataj”.

Zhuangzi (ĉ. 369 a.K. — 286 a.K.) estis ĉefa reprezentanto de la taoista skolo. Li vivis en misero, gardis sin de malbona influo kaj rifuzis fariĝi ŝtatoficisto. Influate de Laozi, li tenis rimarkindan relativisman vidpunkton.



Zhuangzi

Li neis la objektivan kriterion de la vero kaj ne faris distingon inter pravo kaj mal-

pravo, asertante ke “ĉi tie estas malpravo, ankaŭ tie estas malpravo”. Li ankaŭ ne diferencigis vivon kaj morton. Kiam lia edzino mortis, li sonigis poton kaj ĝoje kantis. Pri la rilato inter la subjekto kaj objekto li elmetis la tezon, ke “objekto kaj mi estas egalaj”. Li songis, ke li transformiĝis en papilion. Vekiĝinte li trovis sin denove tia, kia li antaŭe estis. Li do demandis sin mem: “Ĉu Zhuangzi transformiĝis en papilion aŭ papilio fariĝis Zhuangzi?” Li venis al la konkludo: tute egale, ĉu tio estas Zhuangzi aŭ papilio, nenia diferenco troviĝas inter ili; tio prezentis nur ŝanĝiĝon de unu sama objekto. Sekve li asertis, ke oni devas plene fandiĝi en la universo kaj forgesi sian famon, siajn saĝon kaj senton, eĉ sian korpon, por atingi la idealan staton, en kiu kunloĝos la homoj kaj bestoj kaj kunekzistos la homoj kaj objektoj.

La lasta periodo de Militantaj Regnoj (la 3-a jc. a.K.) estis la resuma periodo de diversaj filozofiaj skoloj. Por akomodi sin al la situacio, ke baldaŭ unuiĝos la tuta Ĉinio, Xunzi (ĉ. 313 a.K. — 238 a.K.), granda majstro de la konfuceana skolo, kritike resumis la tezojn de ĉiuj skoloj kaj starigis sian grandan materiisman ideologian sistemon. Li estis reprezentanto de la maldekstraj konfuceanoj. Li kritikis la ideon de la ĉiela volo kaj asertis, ke oni devas diferencigi la homon disde la ĉielo, por ke la naturo servu al la homaro. Sin bazante sur tio, li kritikis ĉiujn teismajn vidpunktojn kaj religiajn, superstiĉajn ideojn, atingis senprecedencan gradon de natur-rigardo kaj fariĝis granda materiisto antaŭ Qin-dinastio. Li asertis, ke “homo naskiĝis malbonkora” kaj fari-

ĝas bonkora nur dank’ al lernado. Tial li metis grandan atenton sur lernadon kaj edifadon. Li proponis en politiko, ke oni apliku samtempe etiketon kaj leĝon, kun la unua kiel la ĉefa. La propono servis kiel teoria bazo de regado por la postaj feŭdaj aŭtokratiaj ŝtatoj.



Xunzi

En 221 a.K. la Unua Imperiestro de Qin-dinastio unuigis Ĉinion kaj per tio finis la separatismon kaŭzitan de princoj. La unuigita feŭda ŝtato postulis unuecan gvidon ideologian, tial finiĝis la situacio de kuna prosperado de la diversaj filozofiaj skoloj. Kian gvidpenson la unuigita feŭda ŝtato bezonis? La mallongdaŭra Qin-dinastio ne havis tempon solvi tiun demandon. Post la fonda de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 24 p.K.) ĝia imperiestro Wudi akceptis la proponon de Dong Zhongshu “neniigi ĉiujn skolojn escepte de tiu de konfuceanoj”, tiel ke la konfuceanisma ideologio fariĝis ortodoksa por la ĉina feŭda socio. La verkoj de la konfuceana skolo estis rekomenditaj de la registaro, kaj leviĝis entuziasmo por ilin studi.

Dong Zhongshu (179 a.K. — 104 a.K.) estis fama studanto de

konfuceanismaj verkoj en la Okcidenta Han-dinastio. Li heredis la ideon de “ĉiela volo” antaŭ Qin-dinastio kaj, utiligante la misteran tezon de kvin elementoj, propagandis la teologian teleologion pri “la ĉielo kaj la homo intersentantaj”. Li diris, ke la ĉielo kreis la homaron laŭ sia formo: la ĉielo havas kvar sezonojn kaj la homo kvar membrojn; la ĉielo havas kvin elementojn kaj la homo kvin internajn organojn; la ĉielo havas 12 monatojn kaj la homo 12 artikojn; ktp., tial la ĉielo kaj la homo estas de la sama speco. Por vivteni la homaron, la ĉielo kreis ĉion en la universo. Unuvorte, ĉio en la universo estas intence aranĝita de la ĉielo. Laŭ tiu vidpunkto, Dong Zhongshu elmetis la tezon, ke “la ĉielo kaj la homo sentas unu la alian.” Li asertis, ke se la monarko, kiu por la ĉielo regas super la popolo, praktikas humanan politikon, do la ĉielo donos al li favoron por kuraĝigo, kaj se la monarko praktikas tiranismon, do la ĉielo kaŭzos naturan katastrofon por averto, kio signifas prizorgi kaj savi la monarkon.

Al la oficiala filozofio opoziciis Wang Chong (27-100 p. K.), fama filozofo de la Orienta Han-dinastio (25-220 p.K.). Li prenis la ideon de Laozi pri “senfareco” kaj fondis la materiisman teorion pri vitala naturo. Li, batalanta ateisto, tre abomenis fanfaronojn kaj forte kritikis la “favoron” kaj “averton” de Dong Zhongshu. En la problemo de homa korpo kaj spirito, li konfirmis la materiisman vidpunkton, ke korpo naskas spiriton kaj spirito dependas de korpo, kaj kritikis la ideisman teismen. Al la problemo de vivo kaj morto li tenis certgrade dialektikan ideologion, opinian-



Wang Chong

te, ke se estas komenco, certe estos fino, se estas vivo, certe estos morto; kaj nur tiu ne mortas, kiu neniam vivas. Per tio li draŝis la furorantan superstiĉan penson, ke homo povas fariĝis senmortulo.

En Wei- kaj Jin-dinastioj (220-420 p.K.) oni ofte militadis. Ŝanceliĝis la konfuceanisma ideologio reganta super la popolo kaj ekfuroris nova filozofia pensfluo defendanta la dekadencan regadon de la imperiestro. La nova skolo neis la teologian

teleologion kaj skolastikon. Ĝi studis la noumenon de la universo kaj nomis *sansĵuan* la tri malfacile kompreneblajn filozofiajn verkojn “Laozi”, “Zhuangzi” kaj “Ĝou Ji”.

Wang Bi (226-249 p.K.), unu el la fondintoj de la filozofia skolo de Wei- kaj Jin-dinastioj, estis ideisma filozofo. Li proponis ontologion kun neesto kiel bazo. La plej esenca punkto de lia filozofio konsistas en “neesto”. “Neesto” signifas “silentan senhavecon” aŭ “silentan nenion”. Tiu “neesto” ekzistas ne ekster, sed en la universo, kaj servas kiel la ĉefa bazo de la ekzisto de la universo. “Kun neesto kiel bazo” karakterizis la komunan vidpunkton de la tiama filozofoj. Wang Bi opiniis, ke la rilato inter “esto” kaj “neesto” estas tiu inter “trunko” kaj “branĉo”. En la ĉina filozofia historio li la unua figure prezentis tiun vidpunkton. Lia “trunko” signifas “neeston” kaj lia “branĉo” fenomenon de la

afero. Li asertis, ke necesas “alte taksu la trunkon kaj ankaŭ la branĉon”. Tio signifas, ke tenante la “trunkon”, oni povas regi la komplikajn per la simplaĵoj kaj neniam konfuziĝos de ia kompleksa, supra fenomenon.

Travivinte la evoluon de tiu filozofia pensfluo, la filozofio de Ĉinio rimarkinde levis sian nivelon de teorio kaj pensado.

(Daŭrigota)

Korekto

N-ro 8, p. 20, la titolo estu legata “Naŝi-nacieca Meteorologia Inĝenierino”.

N-ro 9, p. 6, sub la titolo devas esti aldonata “(Daŭrigo)”.

N-ro 9, p. 13, dekstra kol. 1. 12 desube, anstataŭ “de la urbo. Tie funkcias 35” legu “90 000 loĝantoj. Tie fondiĝis 35”.

N-ro 9, p. 31, en la bildo de la deknaŭa ekzercero la unua kaj dua figuroj devas stari post la tria kaj kvara.

Ĉinaj proverboj

Heĝo fortikiĝas per palisoj,
homo sukcesas dank’ al helpantoj.

Vero ĉiam restas vero;
malvero, ĉiam malvero.

Prefere morti en honoro, ol vivi en malgloro.

Fiero estas frato de malklero.

La falo de unu folio anoncas alvenon de aŭtuno.

Longa voj’ vidigas la forton ĉevalan,
longa tempo provas la koron de homo.

Kiu bone scias aliajn, saĝulo;
kiu bone konas sin mem, prudentulo.



ĈINIO KAJ ITALIO FARIS KUNAN SCIENCAN EKSPERI- MENTON PERE DE ARTSATELITO

Ekde la 15-a de junio ĉi-jare ĉinaj kaj italaj sciencistoj komencis fari kunan sciencan eksperimenton pere de la artsatelito Siriuo. La 16-an de julio Li Xiannian, la prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko, interparolis kun la itala prezidanto Sandro Pertini pere de tiu ĉi artsatelito, gratulante la sciencistojn de la du landoj pro ilia kuna scienca eksperimento kaj dezirante al ili grandajn sukcesojn en la estonta eksperimentado.

La artsatelito Siriuo estis lanĉita en 1977 sub la helpo de Usono. Ĝi jam funkciis ses jarojn en la orbito, kaj, laŭ kalkulo, ĝiaj brulaĵoj ankoraŭ sufiĉas por unujara eksperimentado. Nun tiu ĉi sinkrona orbita artsatelito troviĝas en 65 gradoj de orienta longitudo, 35 800 kilometrojn for de la tero, kaj kovras Italion kaj Ĉinion ambaŭ. La kuna eksperimento ampleksas tiun pri transsendo de elektraj ondoj, telekomunikado, funkciado de la surtera stacio kaj artsatelito en orbito. Nun glate iras la eksperimento.

WANG XIUYING RICEVIS MEDALON DE NIGHTINGALE

La 12-an de majo ĉi-jare la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco donis medalojn de Nightingale al 36 flegistinoj de 11 landoj. La ĉina flegistino Wang Xiuying estas unu el ili.

Wang Xiuying sin dediĉis al eduko pri flegado dum dekoj da jaroj kaj faris gravan kontribuon en tiu laboro. La premio ne nur estas honoro por Wang Xiuying, sed ankaŭ kuraĝigis ŝiajn kolegojn.

Florence Nightingale estis brita flegistino kaj fondinto de la moderna flegologio kaj eduko pri flegado. Tiu premio starigita de la Internacia Ruĝa Kruco estas la plej alta honoro en la internacio por laŭdi la diverslandajn flegistinojn. La medaloj estas donitaj en ĉiu dua jaro.

40 SCIENCAJ KAJ TEKNIKAJ FRUKTOJ EN DISVASTIGO

En Ĉinio, la disvastigo de 40 gravaj sciencaj kaj teknikaj fruktoj por la Sesa Kvinjara Plano de Disvolvado de la Nacia Ekonomio en 1981-1985 estas efektivigita unu post alia, kaj iuj el ili jam donis ekonomian efikon. La 40 disvastigitaj fruktoj inkluzivas aŭtan benzinsparadon, alttensian natrian lampo kaj aliajn.

Laŭ statistiko, ĉiu investado de 10 000 juanoj por disvastigo de novaj teknikoj povas krei produktvaloron de 25 000 juanoj kaj profiton de 5 300 juanoj en unu jaro.

FERVORO POR MEMLERNADO INTER LA ĈINAJ GEJUNULOJ

Laŭ statistiko, en Pekino, Ŝanhajo, Chongqing, Nankino kaj Shenyang pli ol 9 milionoj da gejunuloj memlernas en diversaj formoj. Tiu granda entuziasmo por memlernado videblas tra la tuta Ĉinio.

La universitato koresponda per gazeto funkciigita de Shanxi-provinco kaj memlernaj universitatoj starigitaj de la provincoj Shaanxi kaj Sichuan havas preskaŭ 100 000 junajn gelernantojn, kiuj dislokigis en diversaj partoj de la tuta lando. En Sichuan-provinco pli ol 6 milionoj da gejunuloj persistas en memlernado.

Por helpi gejunulojn en ilia memlernado, oni starigis por la memlernantoj gvidan komitaton,

konsultan stacion kaj helpstacion en diversaj lokoj.

AVANGARDAJ SCIENCISTOJ KAJ TEKNIKISTOJ DE NACI- MALPLIMULTAJ REGIONOJ LAŬDITAJ

En la lasta tagdeko de julio ĉi-jare, pli ol 180 avangardaj sciencistoj kaj teknikistoj el nacimalplimultaj regionoj de Ĉinio kolektiĝis en Pekino por kune diskuti kiel progresigi la scienc-teknikan laboron en siaj regionoj.

Nun en pli ol dek malproksimaj provincoj kaj regionoj de la tuta lando estas pli ol 560 000 sciencistoj kaj teknikistoj, inter kiuj pli ol 300 000 homoj laboras jam pli ol 20 jarojn en nacimalplimultaj regionoj. Inter ili aperis aro da avangardaj personoj kaj kolektivoj. La reprezentantoj partoprenantaj en tiu ĉi kunveno estis elektitaj el pli ol du mil diversnaciecaj progresintaj sciencistoj kaj teknikistoj, inter kiuj 35% venis el pli ol 20 naciecoj mongola, huj-a, tibeta, ujgura, mjaŭ-a, ji-a, ĝuang-a kaj aliaj.

La kunveno premiis pli ol du mil sciencistojn kaj teknikistojn, kiuj atingis rimarkindajn sukcesojn en siaj laboroj, kaj donis honoran diplomon al 300 000 diversnaciecaj sciencistoj kaj teknikistoj, kiuj laboras pli ol 20 jarojn en nacimalplimultaj regionoj.

HAIHE-PARKO EN TIANJIN FINKONSTRUITA

La konstruado de la parko nun jam fundamente finiĝis. Haihe-parko kun areo de 22.9 hektaroj etendiĝas je 19.8 kilometroj laŭlonge de ambaŭ bordoj de Haiherivero. La tuta parko konsistas el roza ĝardeno, ĝardenoj por printempaj floroj, someraj floroj kaj aŭtuna pejzaĝo k.a. Tiuj ĝardenoj kun malsamaj stiloj estas ornamitaj per florbudoj, gazonoj, florbudoj kun artefarita pejzaĝo, ĝarden-lanternoj, kioskoj kaj gravuraĵoj.

RENKONTE AL LA NOVA JARO

ABONVARBA KAMPANJO

por

EL POPOLA ĈINIO

Ekde 1-a nov. 1983 ĝis 28-a feb. 1984

Tiu, kiu abonos aŭ reabonos dum tiu periodo de la kampanjo, ĝuos 20% da rabato kaj senpage ricevos Esp. koloran kalendaron por 1984.

ABONTARIFO

1 jaro (12 n-roj)	£4.00 US\$6.00	post	=£3.20 US\$4.80
2 jaroj (24 n-roj)	£6.50 US\$10.00	rabatado	=£5.20 US\$8.00
3 jaroj (36 n-roj)	£9.00 US\$14.00		=£7.20 US\$11.20

Atentigo: La supra tarifo ne validas por Japanio. Abonantoj kaj reabonantoj tie bonvolu atenti EPC-anoncon en sialandaj Esp.-periodaĵoj aŭ sin turni al la loka peranto.

Memoraĵoj por abonvarbantoj

Kore bonvenigata estos ĉiu, kiu volonte varbos abonantojn por EPC. La varbanto sendu abonant-liston kaj abon-pagojn al la loka peranto kun peto, ke la lasta enskribu lin aŭ ŝin kiel abonvarbanton. Aŭ oni sendu la liston kaj pagojn rekte al la suba adreso. Ĉin-stila memoraĵo iros al ĉiu abonvarbanto proporcie al ties akirita sukceso.

Tamen, ne forgesu aboni aŭ reaboni por vi mem!

PROSPEKTON KAJ PROV-EKZEMPLERON ONI

SENDOS SENPAGE LAŬ PETO

Esperanta Sekcio de CENTRO DE ĈINAJ ELDONAĴOJ

(GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Post la laboro


DANK' al disvolviĝo de la agrikultura produktado pli kaj pli altiĝas la vivnivelo de la kamparanoj, pli kaj pli riĉiĝas ilia kultura vivo. Centro de kultura aktivado fondiĝis en multaj guberniaj urboj kaj komunumoj. Post la laboro kamparanoj povas ĝui filmon kaj operon, aŭ sin amuzi alimaniere. Mi aŭdis multe pri tio, sed dubo min ne for-

lasis, ŝajnis al mi, la tutan tagon kamparanoj sin okupas kiel pri la kamplaboro, tiel ankaŭ pri la mastrumado. La dubo forvaporigis nur tiam, kiam mi vizitis la urbeton Zhengji, kie tre viglas la postlabora aktivado de kamparanoj.

La urbeto situas en la gubernio Tianchang, Anhui-provinco, kun 20 000 loĝantoj. Tiutage,

kiam mi atingis la urbeton, kamparanoj dronis en jubilo de la Lanterna Festo en la 15-a de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro. Mi elaŭtiĝis, kaj la festokirlo tuj min envolvis. Ĉiuj, viroj kaj virinoj, infanoj kaj maljunuloj, en festaj vestoj de diversaj koloroj, svarmis al la urbeta placo, kie okazis la tradicia solenaĵo. Vidu, dekelkaj kamparanoj subtenas buntan drakon, longan je pli ol dek metroj, kaj ĝin dancigas. Ĝia kapo jen leviĝas fiere, jen kliniĝas sopire; ĝia longa korpo jen svingiĝas, jen tordiĝas. Bele vestitaj virinoj remas, ritme kaj gracie, kaj tiel versimile, ke oni kvazaŭ vidus ruliĝantajn ondojn ĉirkaŭ la surtera boato. Kaj tie, knabinoj, portante vekte du florkorbojn, ĉarme dancas sub plezuriga muziko. Belo kaj artismo allogis amason kaj amason da homoj. Baldaŭ formiĝis muroj el la rigardantoj. La malfruaj devis


Antaŭ prezentado



sin altigi per benko aŭ seĝo, kaj iuj eĉ grimpis sur muron aŭ tegmenton por kontentigi la avidajn okulojn. Klakado de petardoj, tondrado de tamburoj kaj gongoj, ŝvebado de kantoj, eksplodado de ridoj . . . la tuta placo montriĝis viva bildo de kamparana festo.

Proverbo diras, ke ĝojigaĵo venas, vizaĝo serenas. Jen la kvara jaro de sinsekva riĉa rikolto en la komunumo de la urbeto. Ni aldonu: kaj la homoj jam festenas. Kamparanoj buĉis porkojn kaj kaprojn. Gejunuloj havigis al si novajn vestojn, infanoj aĉetis petardojn kaj faris lanternojn. Por ke la kamparanoj pasigu ĝoje la Lanternan Feston, la komunumo organizis 12 kantgrupojn, pretigis ses surterajn boatojn kaj du lanternodrakojn. Sume 200 homoj partoprenis en prezentado de lanternaĵakrobataĵoj.

Drakodanco



— Finiĝis la kuna gajado. Disiĝis la kamparanoj. Iuj sin direktis al teatro por rigardi filmon, aliaj paŝis al rakontejo por aŭskulti historiojn, triaj sin turnis al fotejo. Mi sekvis ilin kaj atingis la centron de kultura aktivado.

La centro fondiĝis en 1979. Komence, pro manko de kapitalo, la centro magris. La tereno estis malgranda, ĉio simpla. Poste la komunumo starigis gastejon kaj fabrikon de risortoj kaj faris administradon de diversaj servoj. La enspezo kreskis rimarkinde. La komunumo do asignis sumon al la centro. Dank' al tio la centro vastiĝis kaj kompletiĝis. Nun ĝi aspektas tute nova. La tereno areais 3 000 kvadratajn metrojn, ampleksante kinoteatron, televidejon, legsalonon, stadionon, tablotenisalan ludejon, klubojn, fotejon, librejon kaj aliajn. En la centro laboras ce-

tere opera trupo, radio-komunikad-grupo, du projekciistaj taĉmentoj kaj unu postlabora opera trupo.

La respondeca sistemo de produktado ebligas al la kamparanoj aranĝi sian laboron laŭ propra stato kaj tial ili havas pli da libera tempo. Ĉiutage, post la laboro, multaj kamparanoj vizitas la centron. Maljunuloj rivas per ŝako, infanoj sin regalas per bildolibro, junuloj viglas en la tablotenisa ludejo aŭ korbo-pilkejo. Sed aparte alloga estas la klubo kun elektra ludiloj. Tie ĝojege sin amuzas la etuloj.

Nun la kamparanoj jam havas monon por inviti urban operan trupon. Cetere ili mem organizas postlaborajn operajn trupojn grandajn kaj malgrandajn. La komunumo posedas Yangzhou-operan trupon el 40 elektitaj kleraj gejunuloj. Ili lernis du jarojn

En legsalono



ĉe eminentaj aktoroj kaj ilia prezentado pli kaj pli subtiliĝas. La trupo prezentas operon ne nur en sia komunumo, sed ankaŭ en aliaj. En 1982 la trupo prezentis 388 fojojn. Ilia mita opero "La Amo de Drako-reĝidino" ege bonvenas inter la kamparanoj. Ĝi temas pri tio, kiel filino de drako-reĝo venis inter la homojn por serĉi amon. Lerta prezentado kaj bela voĉo forte vibrigis la kordojn de la kamparana koro. La opero prezentigis dek fojojn sinsekve, kaj la pli ol 700 sidlokoj en la teatro neniam vakis.

En postlaboraj horoj la kamparanojn interesas ankaŭ lernado de scienco kaj tekniko. Ili

ĉasas la sekreton de scienca terkulturo. Komence la centro funkciigis kurson de scienco kaj tekniko, poste, por popularigi la agrikulturan sciencan, la komunumo fondis kamparanan asocion de scienca terkulturo, al kiu aliĝis Yang Jike, scienculo kaj vicprovincestro de Anhui, kiel honora prezidanto de la asocio. Membroj de la asocio liveras scienc-teknikajn materialojn al kamparanoj kaj gvidas scienc-teknikan radiokurson, fervore popularigante agrikulturajn sciencan kaj teknikon. La asocio elkulturis por la produktaj brigadoj jam 300 agrikulturajn teknikistojn. Iuj membroj de la asocio fariĝis spertuloj en scien-

ca terkulturo. Ĉi-flanke tipas la 20-jara Wang Lubin. Li lernas diligente kaj praktikas la sciojn en la produktado. El lia praktikado sekvis sciencaj metodoj de rizpriklado, sterkado kaj mortigo de fiinsektoj. Ĉe li ĉiam estas riĉa rikolto de rizo.

Kamparanoj havas tempon kaj intereson ankaŭ por serĉi plezuron ĉe floroj. Ili amas ornamisian loĝejon per floroj. Konsiderante tion, la centro de kultura aktivado konstruis floran ĝardenon. La helaj forcejoj kaj ordaj bedoj preskaŭ ne diferencas de tiuj en urbegoj. Mia vizito okazis en vintro. Malgraŭ tio mi povis ĝui freŝigan verdon per tieaj kamelio, osmanto (*Osmanthus fragrans*), gardenio, aglao (*Aglaia odorata*) ktp. Tiam jasmeno jam floris. Ĝardenisto diris al mi: "Ni havas pli ol 80 specojn de floroj raraj kaj valoraj. Pasintjare ni elektis 300 potojn por la flora ekspozicio de la gubernio." Nuntempe troviĝas 400 familioj en la komunumo, kiuj kulturis florojn.


Komprenble, ne ĉie en la ĉina kamparo regas tia vigleco, kiu mankas precipe en dezertaj montregionoj kun postiĝinta agrikultura produktado. Oni devas ankoraŭ strebi por riĉigi la tiean kulturen vivon.

Snurtirado



Somera kampado de komunika scienco kaj tekniko

Fotoj de LI CHUNGENG




1983 estas la Monda Komunika Jaro. Okaze de tio oni aranĝis someran kampadon de komunikado por geknaboj en diversaj lokoj de Ĉinio. La kampado en Pekino daŭris de la 19-a ĝis la 28-a de julio. Ĝiaj partoprenantoj el mez- kaj elementaj lernejoj estis amatoroj de komunika scienco. Ili vizitis la Pekinan Telegrafian Centron kaj surteran stacion de persatelita komunikado, faris komunikan praktikon kaj ekskursis al pitoreskejoj.


Ce surtera stacio de satelita komunikado

Inaŭguro





Konkurso de skribado de telegramo



1 En vidoregistro

2 Rigardo al ĉina
tersatelito

3 En la Pekina
Telegrafia Centro

4 Rigardo al
radiofaksimila ekipaĵo




Ili komunikas kvazaŭ
en tanko.



Komunikado sukcesis!





En konkurso de telekomuniko

Gaja balo en parko



Ĉina

Tradicia

Kalendaro

de LI QIANG

ĈINIO estas unu el la landoj, kies astronomio evoluis plej frue. Dum miloj da jaroj en tiu scienca kampo la ĉinoj akumulis abundon da valoraj materialoj, kiuj vekis atenton ĉe diverslandaj sciencistoj. Kalendaro estas grava konsistiga parto de la ĉina antikva astronomio. En ĉinaj historiaj libroj estas specialaj ĉapitroj pri diversperiodaj kalendaroj. Ĉiuj tiuj notoj multe helpas nin en studado pri la ĉina tradicia kalendaro.

La kalendaro de diversaj landoj, kiuj sin bazis sur malsamaj bazoj en malsamaj periodoj, povas esti dividitaj ĝenerale en tri kategoriojn.

La luna kalendaro. Ĝi estas bazita sur la fazoj de la luno. Ĉar la tagoj inter du sinsekvaj novlunoj ne estas entjeraj, tial la lunmonatoj alternas per 29 kaj 30 tagoj. Ĉiu lunjaro havas 12 monatojn, inter kiuj ses havas po 30 tagojn kaj ses po 29 tagojn. Pro malakordo kun la agrikultura produktado kaj la homa vivo, tia kalendaro jam arkaikiĝis en multaj landoj, escepte de kelkaj islamaj landoj.

La suna kalendaro. Tia kalendaro estas difinita laŭ la movado de la suno. Ĝia baza periodo estas la tropika jaro. Laŭ tia kalendaro ĉiu ordinara jaro havas 365 tagojn, dum superjaro 366 tagojn. En 400 jaroj estas 97 superjaroj. Ĉiu sunjaro havas 12 monatojn, kiuj havas po 30 aŭ 31 tagojn. Pro sia precizeco, la suna kalendaro estas populare

uzata de multaj landoj en la mondo, sekve ĝi estas nomata ankaŭ internacia kalendaro.

La lun-suna kalendaro. La nomo per si mem diras al ni, ke tia kalendaro entenas karakterizaĵojn kaj de la luna kaj de la suna. Alivorte, ĝia monato egalas al la tempodaŭro de unu kompleta revoluo de la luno ĉirkaŭ la tero (t.e. la luna monato), dum ĝia jaro al la tempodaŭro de unu kompleta rondiro de la tero ĉirkaŭ la suno (t.e. la tropika jaro). Tia kalendaro havas siajn apartajn avantaĝojn, t.e. la datoj de la monato montras certan lunaspekton. Ekzemple komence de la monato vidiĝas ĉiam la novluno, kaj meze de la monato la plenluno. Krome, la tempodaŭro de unu jaro tute konformiĝas kun la kvar sezonoj de printempo, somero, aŭtuno kaj vintro.

La plej granda problemo en la lun-suna kalendaro estas, kiom da monatoj devas esti en unu jaro, ĉar inter la lunmonatoj kaj la tropika jaro ne estas komuna dividanto. En praktikado, la antikvuloj trovis, ke ĉiu tropika jaro havas 11 tagojn pli multe ol 12 lunmonatoj, sekve en tri jaroj superfluigis 33 tagoj. Surbaze de tio oni difinis, ke ĉiu ordinara jaro havas 12 monatojn kaj ĉiu tria jaro estas superjaro, kiu havas 13 monatojn.

De antaŭ Qin-dinastio (221 — 207 a.K.) ĝis la fino de Qing-dinastio (1644 — 1911 p.K.) Ĉinio havis sume pli ol cent famajn kalendarojn. Ili ĉiuj estas lun-sunaj kalendaroj. La ĉina antikva astronomio ekaperis en la primitiva socio. Legendo diras, ke en la periodo de tribestro Yao (ĉ. 24-a jc. a. K.) sin trovis oficisto, kiu profesie zorgis pri astronomio. Tiam unu jaro havis 366 tagojn kun kvar sezonoj. Meze de la periodo de Printempo kaj Aŭtuno antaŭ 2 500 jaroj, surbaze de multjara observado kaj preciza kalkulado, niaj prauloj eltrovis la metodon "instali 7 superjarojn en 19 jaroj". La metodo estas pli preciza ol tiu instali unu superjaron

en tri jaroj. Laŭ tiu metodo, la tempodaŭro de 19 kalendaraj jaroj kaj tiu de 19 tropikaj jaroj estas preskaŭ egalaj. Tio estas signifoplena impeto en evoluado de la ĉina kalendaro. Dank' al tiu metodo, pli bone akordiĝis inter si la luna kalendaro kaj la suna kalendaro kaj fundamente identiĝis la sezonmonatoj kun la ŝanĝiĝo de klimato.

En la periodo de Militantaj Regnoj (475 — 221 a. K.), la giganta socia transformiĝo kaj viglaj aktivadoj de cent skoloj ege akcelis la disvolvon de astronomio. Tiam oni ellaboris kaj uzis sinsekve 6 kalendarojn. Laŭ tiuj kalendaroj unu tropika jaro havas 365 kaj kvaronan tagojn. Ĉar la ĉina tradicia kalendaro evoluis surbaze de tiu ellaborita en la dinastio Xia (ĉirkaŭ la 21-a jc. a.K. ĝis la 16-a jc. a.K.), oni kutime nomas ĝin "Xia-kalendaro".

Kun la socia evoluo, aperis nombro da elstaraj astronomoj en la ĉina historio. Ili plurfoje reformis kaj reviziis la tradician kalendaron kaj ellaboris novajn kalendarojn unu post alia. En la Okcidenta Han-dinastio, Deng Ping, Lo Xiaohong ellaboris "Tajĉu-kalendaron" en la jaro 104 a.K. Ĝi estas la unua komplete registrita kalendaro de Ĉinio. En la periodo de la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj (402 — 589 p.K.), eminenta ĉina matematikisto kaj astronomo Zu Chongzhi renovigis la malnovan kalendaron kaj ellaboris en la jaro 462 "Daming-kalendaron", laŭ kiu en 391 jaroj estas 144 superjaroj. Poste en Tang-dinastio (618 — 907 p.K.), surbaze de longtempa observado kaj preciza kalkulado, astronomo Yi Xing finis en la jaro 727 la manuskripton de "Dajan-kalendaro", kiu servis kiel modelo por ĉiuj postaj kalendaroj. En Yuan-dinastio (1271 — 1368 p.K.), Guo Shoujing ellaboris en la jaro 1280 "Ŝouŝi-kalendaron", kiu estis uzata dum pli ol 300 jaroj ĝis kiam pereis la dinastio Ming (1368-1644 p.K.). En

HISTORIAJ OBJEKTOJ

LAN SHAN:

Antikvaj Freskoj de Naciminoritatoj en Yunnan

Taj-a fresko — Gardanta elefanto de princo



PROVINCO Yunnan situas ĉe sudokcidenta landlimo de Ĉinio. Tie loĝas multaj naciminoritatoj. La antikvaj freskoj konservataj en tiu provinco okupas sian lokon en la brila kultura trezorejo de la ĉina nacio.

SURROKAJ PENTRAĴOJ DE CANGYUAN

Surrokaj pentraĵoj de Cangyuan estis trovitaj en 1965, kaj iom post iom altiras atenton en kaj ekster Ĉinio.

Gubernio Cangyuan situas en sudokcidenta parto de la provin-

co Yunnan, najbare de Birmo. Tie vivas va-naciecanoj de Ĉinio. La plej frue trovitaj surrokaj pentraĵoj videblas sur montdeklivo proksima al la vilaĝo Manpa. La deklivo estas longa je ĉ. 30 m. kaj alta je pli ol 5 m. ĉe la supro. Sur ĝi pentriĝis centoj da diversspozaj homoj, bovoj, simioj, birdoj kaj aliaj animaloj, grandaj kaj malgrandaj. La pentristoj prenis miksaĵon de hematito-pulvoro kaj animala sango kiel farbon, kaj manon, plumon aŭ vegetalan fibron kiel penikon. Laŭ eksperimento, la pentraĵo jam travivis pli ol 3 000 jarojn.

Nun tie jam malkovriĝis dek surrokaj pentraĵoj kun pli ol mil distingeblaj bildoj, ekzemple homo, animalo, domo, vojo, arbo, kaverno, ŝipo, suno. . . La pentraĵo "Vilaĝo" estas tipa surroka pentraĵo. Ĝi vidigas vilaĝon kun domoj el palisaroj, kaj vivecan scenon de kultivado, brutobredado kaj ĉasado fare de vilaĝanoj. La pentristo emfazis ne pri detala priskribo, sed pri impresado de la tuto, kaj per originala maniero montris spacajn rilatojn. Dank' al tio oni image konis la vivon de va-naciecanoj antaŭ pli ol 3 000 jaroj.

la fino de Ming-dinastio kaj komenco de Qing-dinastio, enkondukiĝis en Ĉinion la okcidentaj scienco kaj kulturo, kaj ankaŭ la internacia kalendaro. Malgraŭ, ke la internacia kalendaro havas multe da avantaĝoj, Ĉinio daŭre uzis sian tradician lun-sunan kalendaron. En la jaro 1912, Ĉinio komencis uzi la internacian kalendaron.

Depost la periodo de Militantaj Regnoj, adapte al la agrikultura

produktado, formiĝis iom post iom 24 sezondividoj en la ĉina tradicia kalendaro. La ĉinaj kamparanoj ŝatas uzi tiun ĉi kalendaron por sin direkti en agrikulturaj okupoj. Pro tio la kalendaro nomiĝas ankaŭ agrikultura kalendaro. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en la jaro 1949, ĉinoj ekuzis samtempe la internacian kalendaron krom sia propra tradicia kalendaro. Nun ni eldonas la kalendaron, kiu indikas

ne nur la jaron, monatojn, datojn kaj tagojn laŭ la internacia kalendaro, sed ankaŭ la jaron, monatojn, datojn kaj sunperiodojn laŭ la ĉina agrikultura kalendaro. Tiu kalendaro estas tre oportuna en uzado.

Pri 24 sunperiodoj en la ĉina agrikultura kalendaro, ni konigos al vi, niaj legantoj, venontnumere sub la rubriko "Enciklopedieto de Ĉinio".

FRESKOJ DE LIJIANG

Freskoj de Lijiang dislokiĝas en dekkelkaj temploj en la Lijiang-a Naŝi-nacieca Aŭtonoma Gubernio. Ili temas ĉefe pri budhaj statuoj kaj rakontoj el sutroj.

La freskoj plenumiĝis en du periodoj. Tiuj de la antaŭa estis faritaj de la fino de la 14-a jc. ĝis la antaŭa duono de la 16-a jc. kaj tiuj de la posta estis faritaj de la mezo de la 16-a jc. ĝis la fino de la 17-a jc. La unuaj periodaj freskoj ĉiuj temis pri rakontoj el klasikaj verkoj de Budaismo kaj Taoismo. La pentra arto de ili estis rigore kadrita en tradicio de religia pentrado de interna Ĉinio depost la deka jarcento. La stilo estis antikveca kaj modesta, bildoj majestaj kaj dignaj, koloro orbrila kaj pompa, linioj fluecaj kaj figuroj ĝustaj kaj delikataj. La post-periodaj pentraĵoj ne nur heredis pentrarton de interna Ĉinio, sed ankaŭ sorbis tibetan pentran stilon kun zorga kaj preciza esprimo, delikata penikouzo kaj mistera nuanco, tiel la freskoj fariĝis pli enhavoriĉaj ĉu en temo ĉu en stilo.

La fresko "La Granda Ĉiela Dio" estas pentraĵo de pura tibeta stilo. Per dura penik-tuŝo, fluecaj linioj, okulplaĉaj koloro kaj plastiko, oni elstarigis la altan figuron de la animskua Granda Ĉiela Dio.

La freskojn de Lijiang pentris ne nur tiulokaj naŝi-naciecanoj, sed ankaŭ metiistoj pri pentrado de han-a, baj-a kaj tibeta naciecoj. Tiuj freskoj estas arta kristalo de longtempa kultura interŝanĝo inter diversnaciecaj popoloj en la nordokcidento de la provinco Yunnan kaj servas kiel atesto de tradicia amikeco inter ili.

TOMBAJ PENTRAĴOJ DE ORIENTA JIN-DINASTIO

En 1963, en la nordokcidento de Zhaotong-gubernio, Yunnan-provinco, oni prifosis antikvan tombon de Orienta Jin-dinastio (317-420 p.K.). Tiu tombo konstruiĝis inter 366 kaj 394 p.K. Estas pentritaj kaj la volbo kaj la muroj. Jen la plej fruaj tombaj pentraĵoj trovitaj en provinco Yunnan, kaj solaj bone konservataj tombaj pentraĵoj de Jin-dinastio.

Sur la norda muro de la tombo, ĉe la mezo oni elstare pentris la maŝtron de la tombo en sida pozo. Ambaŭflanke kaj sube staras sekvantoj, servistoj kaj servistinoj.

Sur la orienta muro estas du vicoj da homoj. Unu vico portas funebrajn signal-rubandojn, kaj la alia rajdas.

Sur la okcidenta muro estas kvar vicoj da homoj. La supra estas soldatoj kun glavo en mano, kaj la malsupra estas rajdantoj. Ili ĉiuj estas en han-nacieca kostumo, meze de ili estas du vicoj da soldatoj en ji-nacieca felta mantelo. Tiu bildo "Soldatoj de han-a kaj ji-a naciencoj" estas tre valora por studi la kontakton inter la du naciecoj.

Sur la suda muro de la tombo pentriĝis domoj, pordegoj kaj kirasitaj gardistoj, kun nuboj kaj similaj ornamaj desegnoj ĉirkaŭe.

Tiuj tombaj pentraĵoj estas faritaj de lokaj artistoj. Kvankam ne alta estas la pentra arto, tamen ili vivece montris kostumojn de han-aj kaj ji-aj soldatoj antaŭ pli ol 1 500 jaroj, tiamajn etiketajn sistemojn kaj religiajn konceptojn, tial ili havas gravan signifon por arkeologia esploro.

FRESKO DE JI-NACIECO

En Wenchang-palaco de la Weishan-a Ji- kaj Huj-nacieca Aŭtonoma Gubernio videblas fresko de Qing-dinastio (1644-1911 p.K.): "Amuzado sub Arbo". Ĝi spegulis ĝojan festadon de ji-naciecanoj. En festotago, viroj kaj virinoj rendevuas, kaj dekoj da homoj dancas en rondo, akompanate de fluto kaj bambutuba buŝharmoniko.

Tiu fresko, larĝa je 117 centimetroj kaj alta je 100 centimetroj, estas pentrita per farboj nigra, verda, ruĝa, blua kaj bruna, en simpla kaj maldelikata stilo. Ĝin pentris probable lokaj pentristoj. Ĝi lokiĝas sur unu flanko de pavilono. Malgraŭ ventumo, sunumo kaj humida korodo dum pli ol 200 jaroj, ĝia koloro ankoraŭ estas freŝa. Ĝi estas unu el la bone konservataj ji-naciecaj freskoj en la subprovinco Dali. Malmultaj el la ji-naciecaj freskoj estas postlasitaj. Kvankam tiu pentraĵo estis farita en proksima jarcento, kaj miksiĝis de nemalmulte da han-nacieca pentra stilo, tamen ĝi vivece surpaperigis morojn kaj kutimojn de ji-nacieco en la 17-a jarcento, tial ĝi ankoraŭ estas valora pentraĵo.

FRESKO DE TAJ-NACIECO

La taj-oj estas antikva nacieco. Laŭ dokumentoj, frue en la periodo de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 24 p.K.) taj-oj jam laboris kaj vivis en limregionoj de la provinco Yunnan.

Taj-oj kredas je budaismo, kaj la lasta multe influis la literaturon kaj arton de tiu nacieco. Inter taj-naciecaj freskoj sufiĉe multaj estas freskoj en budaj temploj, kiuj ĉefe temas pri budaj statuoj kaj rakontoj el

sutroj. Pro tio ke en taj-aj bu-
daismaj temploj la muro estas ne
granda, iuj pentraĵoj estas fari-
taj unue sur ŝtofo, kaj poste
estas pendigitaj inter kolonoj de
templo. Jen surŝtofaĵaj pentraĵoj
kun aparta gusto.


La taj-aj freskoj temas pli mul-
te pri homoj ol pri paradizo, kio
montras ke la pentristoj konscie
priskribis sekularan vivon en
religiaj pentraĵoj. Sur la fresko
“Danco Omaĝe al la Budho”
dancas tri virinoj. Iliaj mienoj
kaj dancmovoj estas ĉarmaj kaj
korvibrigaj, kaj ilia kostumo po-
sedis karakterojn de taj-a kostu-
mo.

La taj-aj popolanoj estas en-
tuziasmaj, senĝenaj kaj revemaj.
En laboro kaj vivo ili kreis mul-
tajn popolajn rakontojn mirin-
dajn, belajn kaj emociajn. Temoj
de multaj freskoj devenas de fol-
kloro. La fresko “Simio-vojgvi-
danto el rakonto ‘Zhaoshutun’”
ja estas ekzemplo. Brava kaj
bela taj-nacieca knabo Zhaoshu-
tun kaj bela pavo-knabino Lan-
nona de malproksima lago
Langsna fariĝis geedzoj. Poste
Zhaoshutun iris rezisti kontraŭ
agresantoj, kaj Lannona estis
kalumniita kiel sorĉistino. Ŝi
povis nur meti sur si pavoplumaron kaj forflugis al sia hejmlando. Triumfe reveninte, Zhao-

shutun ne vidis sian edzinon. Li
rajdis al la lago Langsna. La ĉe-
valo mortis survoje. Kortuŝite
de la fideleco de Zhaoshutun al
amo, la dio de la lago Langsna
donacis al li simion kiel vojgvi-
danton. Ĝi helpis Zhaoshutun
venki multajn malfacilojn. Fine
Zhaoshutun trovis Lannona,
venkis la diablon, revenis hej-
men kune kun sia kara edzino.
Ili ree havis pacan kaj feliĉan
vivon.

Viveca estas la fresko pri la
simio-vojgvidanto. La legendo
“Zhaoshutun” estas unu el la
valoraj literaturaĵoj kaj artaĵoj
de taj-nacieco.

LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Pekino
2. Jangzi-rivero
3. Flava Rivero
4. Yangzhou
5. Xuzhou
6. Hongze-lago
7. Huaiyin
8. Guangdong
9. Yunnan
10. Fujian
11. Guangxi
12. Hainan-insulo
13. Ŝanhajo
14. Changbai-montaro
15. Jilin
16. Nankino
17. Luoyang
18. Tianchang
19. Dali
20. Tianjin

Mi Amas Esti Manekeno

de XU PING

Prezentado de modaj vestoj estas ofta en multaj landoj, sed nova afero en Ĉinio. Ĉi tie Xu Ping, unu el la unuaj manekenoj de Ĉinio, eldiris al niaj legantoj la ĝojon kaj ĉagrenon, kiujn kaŭzis al ŝi la profesio.

— La Red.

Eĉ en miaj lernejoj plene naj de revoj, mi neniam pensis, ke mi havos nedisigeblan ligon kun profesio de manekeno. Tio estas vera, ĉar la profesio estas tute fremda al mi.

Mi fariĝis manekeno dank' al hazarda bonŝanco.

En 1979 mi diplomitiĝis el mezlernejo kaj malsukcesis en enira ekzameno por universitato. Nelonge poste mi estis akceptita en iun butonfabrikon kaj servis tie kiel kontrolisto de produktaja kvalito. Post duonjaro la Ŝanhaja Vestokompanio elektis modelojn inter laboristoj de 88 siaj dependaj fabrikoj, kaj mi estis elektita.

Sed efektive tiam mi sciis nemon pri la arto, ĉar en nia lando oni neniam okazigis modvestan prezentadon. Laŭ mia malklara kompreno, tiu laboro eble similas al arta prezentado. Mi ekŝatis kanti kaj danci en la infaneco. Mi pensis, ke tiu laboro probable estas tre interesa. Mi decidis fari provon. Mi do diris tion al miaj gepatroj. Sed ekster mia atendo mia patro forte protestis. Li, altklasa inĝeniero, bo-

ne scias kvar fremdajn lingvojn. Li esperis, ke mi, lia solfilino, fariĝos tradukisto, tial li proponis, ke mi lernu en postlabora universitato de la Fremdlingva Instituto. Sed mia obstineco pelis min al mia propra elekto. Kun intenco provi mi aliĝis al la unua ĉina taĉmento de modvesta prezentado kaj fariĝis ĝia membro.

En la tria tago, sub la gvido de instruisto, mi kaj aliaj dek membroj komencis korpan trejnadon kiel baletistoj. Ĉiutage, post trejnado, ni estis ĝismorte lacaj kaj rimarkis la piedojn ŝvelaj. Precipe en someraj tagoj, malgraŭ la varmego ni devis trejni nin en dikaj trejvestoj, kaj trinki estis malpermesate. Pro tio mi iam larmis kaj volis forlasi la laboron.

Poste io firmigis mian decidon praktiki la profesion. Tio estis en la komenco de 1981, kiam nia taĉmento unuafoje prezentis en la Ŝanhaja Komerca Halo. La spektatoroj ĉiuj estis fremdlandaj komercistoj. Antaŭ la prezentado mi tiel timis, ke mia koro kvazaŭ elsaltos el la

gorĝo. Mi ne sciis, kio sekvos el nia prezentado. Mi sursceniĝis kun granda maltrankvilo. Tamen, neatendite, dum nia pli-ol-

Xu Ping en prezentado





Xu Ping

unu-hora prezentado mi vidis multajn fotografilojn direktataj al ni kaj aŭdis diskuton de la spektatoroj. Kvankam ili parolis en malsamaj lingvoj, tamen la varma atmosfero anoncis, ke ni sukcesis. Tuj post kiam finiĝis nia prezentado, multaj fremdlandaj komercistoj volis mendi niajn vestojn, dirante: "Ni ne atendis, ke en Ĉinio troviĝas tiel belaj vestoj, tiel belaj muziko kaj danco-prezentado!" Tiu afero forte min skuis. Mi pensis, ke se mi povas iom kontribui al la civilizacio kaj beleco de la homaro, tio alportos grandan valoron.

Ekde tiam mi fariĝis fidoplena pri mia laboro kaj eksentis, ke

mia vivo estas enhavoriĉa kaj ĝoja, kvankam ĝi estas streĉa, iam eĉ peniga. Ĉiumatene ni devas kuri en longa distanco kaj poste fari korpan trejnadon kaj preparan artan prezentadon. Posttagmeze ni havas lecionojn de muziko, belarto kaj ŝminkado. Krome niaj estroj aparte funkciigis por ni kurson de vestotajlado. Tial ni ne maltrankviliĝas pri nia estonteco, kiam ni ne plu taŭgos esti modeloj.

En nia taĉmento estas 14 ludantoj, inter kiuj mi estas unu el la ĉefaj. En ĉiu prezentado mi devas alterne meti sur min 20 specojn de vestoj elektitaj de nia instruisto laŭ niaj karakteroj, temperamentoj kaj aspektoj. Mi estas serena, tial jako, robo kaj ceremonia vesto konvenas al mi. Ĉiufoje, kiam ni prenis veston, antaŭ ĉio ni esploris ĝiajn trajtojn, proponis programerojn kaj poste petis konsilojn de nia instruisto. Verdire, por modvesta prezentado oni bezonas ankaŭ multajn sciojn. Ekzemple, kiam ni prezentas en tradiciaj ĉinaj virinaj roboj, ni devas nin montri seriozaj kaj graciaj; kiam en alispecaj roboj ni devas montriĝi viglaj; sed kiam en jakoj, ni devas teni nin nature kaj senĝene.

Sur la scenejo ni prezentas vigle kaj facilmove, sed post la kulisoj ni estas tre streĉaj. Ni devas vesti nin en nur dekoj da sekundoj, iom ordigas nin antaŭ spegulo kaj haste sursceniĝas.

Ni vivas kaj en laco kaj en ĝojo. Nia ĉiutaga trejnado estas peniga. Por ke ni ne dikiĝu, ni devas manĝi modere. Mi ŝatas lakton, sed mi devas deteni min. Ni ne vane laboris, ni jam atingis sukcesojn. Dank' al nia prezentado altiĝis la pozicio de ĉinaj vestoj en la mondo. Foje iu fremdlanda komerca delega-

cio venis al Ĉinio por mendi vestojn, sed ili elektis neniun en pluraj urboj. Fine ili spektis nian prezentadon en Ŝanhajo kaj tuj mendis 640 000 vestojn.

Tamen ne ĉio en la vivo povas vin kontentigi. Ĝi donas al vi ion, sed perdigas al vi ankaŭ ion alian. Kiam mi ricevis mian ŝatatan okupon, mi tamen perdis mian amaton. La kaŭzo estas, ke li ne volis, ke mi estu manekeno. Laŭ lia opinio tiu laboro estas senperspektiva. Mi ne toleris lian vidpunkton. Mi diris al li, ke kvankam tiu profesio estas nove leviĝanta en Ĉinio, tamen havas brilan perspektivon. Sed li estis surda al miaj vortoj, kio ege kolerigis min. Finfine ni disiĝis post kelka diskutado. Mi opinias, ke virino devas esti memstara, kaj esperas, ke mi edziniĝos al tiu, kiu komprenas min kaj subtenas min en mia laboro. Mi ne volas forlasi mian karieron pro edzo.

Malgraŭ tiaj aŭ ĉi tiaj malfaciloj sur mia vivovojo, inkluzive de la riproĉo de la patro kaj la forlaso de la amato, mi tamen ne sentis solecon. Dum ĉiu prezentado mi vidis, ke la halo estas plenplena de rigardantoj, kaj aŭdis varmajn aplaŭdojn. Tiam mi estis tre kontenta kaj ĝoja, ĉar oni respektis nin, modelojn. Pro nia afero kelkaj 27-28-jaraj manekenoj en nia taĉmento ankoraŭ ne edziniĝis kaj iu unusola edziniĝinta kolego jam havas 29 jarojn, sed ankoraŭ ne volas gravediĝi.

Depost la fondiĝo de nia taĉmento jam elkribriĝis tri grupoj da modeloj. Ĉi-jare mi aĝas 24 jarojn kaj jam estas "veterano" en nia taĉmento. Mi ne estas certa, kiam ankaŭ mi devos forlasi tiun okupon, tamen la travivaĵo de tiuj jaroj bele gravuriĝos en mia memoro.

La politiko de Tang-dinastio en la komencaj jaroj

de BA HONG

LA kamparana insurekcio renversis la regadon de Sui-dinastio. Li Yuan, prefekto de Taiyuan, fine uzurpis la fruktojn de la insurekcio kaj fondis Tang-dinastion, kiu daŭris 290 jarojn. Tiu dinastio estis fame konata pro la granda politikisto Imperiestro Li Shimin, la sola imperiestrino en la ĉina historio Wu Zetian, Xuanzang, kiu pilgrimadis al la sudazia subkontinento por peti budhismajn sutrojn, la grandaj poetoj Li Bai kaj Du Fu kaj la "Silka Vojo" inter la Oriento kaj Okcidento. La civilizacio de Tang-dinastio influis ne nur la Orienton, sed ankaŭ la tutan mondon, tial ĝi fariĝis granda orienta imperio fame konata en la homa historio.

LI YUAN LEVIĜIS EN TAIYUAN

Li Yuan estis hereda nobelo. Imperiestro Yangdi de Sui-dinastio sendis lin gardi la gravan nordan urbon Taiyuan por subpremi kamparanan insurekcion. Poste ĉie leviĝis la insurekciaj armeoj kaj fariĝis evidenta la pereado de Sui-dinastio. Instigate de siaj filoj Jiancheng, Shimin kaj Yuanji, Li Yuan leviĝis kontraŭ Sui-dinastio. Li gvidis sian armeon al la suda Shaanxi, konkeris Chang'an kaj imperiestriĝis en 618 p. K. Tiel naskiĝis Tang-dinastio. Li nomumis Jiancheng

kronprinco, Shimin princo Qin kaj Yuanji princo Qi. Inter ili Shimin estis la plej elstara pro sia saĝeco kaj kuraĝo. Lia armeo akiris grandajn meritojn en la milito, tial li fariĝis la ĉefa fondinto de Tang-dinastio.

EVENTO ĈE LA PORDO XUANWU

Li Yuan gajnis venkojn politikan kaj militan kaj fundamente unuigis la tutan landon. Sed akriĝis la batalo inter liaj filoj por regpotenco.

Li Shimin faris grandan meriton en la milito por unuigi la landon kaj samtempe grandigis sian forton. Sub li estis multaj talentuloj, tial formiĝis kaj grandiĝis lia propra forto en la tuta lando.

La kronprinco Li Jiancheng ankaŭ estis talenta en politika kaj milita aferoj. Li ĉiamaniere kolektis diversajn eminentajn personojn ĉirkaŭ si, tial lia forto estis ne malpli granda ol tiu de Li Shimin. Li klare vidis, ke Li Shimin minacas lian pozicion, tial li komplotis kun sia alia frato Li Yuanji por atenci Li Shimin.

En 626 p. K. la norda nacimalplimulto Tujue invadis la landon. Profitante tiun ŝancon, Li Jiancheng rekomendis al sia patro, ke li nomumu Li Yuanji

milita komandanto kaj disponigu la elitajn soldatojn kaj generalojn de Li Shimin por lin murdi.

Li Shimin rimarkis sian pozicion minacata kaj senprokraste ekagis por superi la rivalon. Li subaĉetis la gvardian estron de la pordo Xuanwu, fidindan subulon de la kronprinco kaj embuskigis sian elitajn trupon ĉe la pordo. La pordo situis ĉe la norda flanko de la palaca urbo Chang'an kaj estis nepre trapasejo por ricevi imperiestran aŭdiencon.

Tiun tagon, Li Jiancheng kaj Li Yuanji rajdis al la imperiestra palaco. Proksime al la pordo Xuanwu, ili subite rimarkis la staton nenormala kaj tuj sin turnis. Li Shimin gvidis embuskigitajn soldatojn ilin surprizi kaj sage pafmortigis Li Jiancheng. Ankaŭ Li Yuanji estis mortigita en la luktado. Ĉinaj historiistoj nomis tion "Evente ĉe la Pordo Xuanwu". Post ne longe Li Yuan devigite abdikis sian imperiestrecon, kaj la 28-jara Li Shimin surtroniĝis. Li estis imperiestro Taizong de Tang-dinastio.

PRUDENTA REGADO DUM ZHENGUAN-ERAŬ

Post surtroniĝo imperiestro Taizong nomis sian reg-eraon

Zhenguan. Dum sia regado li praktikis prudentan politikon, volonte akceptis admonojn, enoficigis eminentulojn kaj reduktis servuton kaj terimposton, kio stabiligis la socion kaj bonigis la socian moron. Tio en la historio estis nomata "Sukcesa Regado dum Zhenguan-erao".


Taizong promociis oficistojn, tute ne konsiderante ilian antaŭan kulpon. En lia kortego estis nemalmultaj personoj, kiuj iam oponis kontraŭ li. Unu el ili estis Wei Zheng. Wei antaŭe estis konsilisto de Li Jiancheng kaj proponis al la mastro pli frue mortigi Li Shimin. Poste Taizong lin riproĉis: "Kial vi malpacigis miajn fratojn kaj estigis tiel seriozan batalon kon-

traŭ mi?" Wei Zheng respondis aplombe: "Se la kronprinco akceptus mian konsilon, certe ne estus lia hodiaŭa pereco." Taizong laŭdis lian talenton, anstataŭ lin puni, li komisiis al li gravan oficon.

Wei Zheng kuraĝis prezenti rekte siajn opiniojn al la imperiestro. Iufoje, kiam Taizong ludis cirkuon, Wei Zheng eniris por raporti al li ion. Taizong haste kaŝis la cirkuon en sian robon. Wei Zheng intence plilongigis la raportan tempon kaj rakontis al li historiajn lecionojn de antikvaj imperiestroj pri ilia diboĉado. Timante Wei Zheng, Taizong ne kuraĝis elpreni la cirkuon. Kiam Wei Zheng foriris, la cirkuo jam estis

sufokita. Pri tio li malkontentigis.

Poste Wei Zheng faris al li ĉiam pli multajn rimarkigojn ĉe la aŭdienco, tion Taizong toleris. Foje, post aŭdienco Taizong revenis al sia loĝejo kaj kolere diris al si: "Mi certe mortigos tiun kampulon!" La imperiestra edzino Zhangsun demandis: "Kiun via imperiestra moŝto volas mortigi?" Taizong respondis: "Neniun alian ol Wei Zheng! Li ofte ofendis min en la kortego. Tion mi ne plu toleros!" La edzino tuj eliris, kaj post momento solene eniris en vestoj de imperiestra edzino, gratulante la imperiestron. Taizong kun miro demandis la kialon. Ŝi diris aplombe: "Mi



Princino Wencheng kaj Sunzamkampo

Ilustraĵo de REN MENGXIANG

aŭdis, ke nur talenta suvereno havas fidelajn subulojn. Nun via imperiestra moŝto estas talenta, tiel ke Wei Zheng kuraĝas senkaŝe verŝi sian koron. Kial mi povus ne gratuli!" Aŭdinte tion Taizong ekĝojis. Poste Wei Zheng mortis de malsano, Taizong tre malĝojis, dirante: "Mi perdis lin kiel spegulon."

Por kolekti pli multe da talentuloj, Taizong nomumis oficistojn per ekzameno. Dank' al tio pli multaj ordinaraj popolanoj fariĝis oficistoj. Kiam li vidis ke multaj ekzamenitoj fariĝis oficistoj, li diris kontente: "La tutlandaj eminentuloj kolektiĝis ĉe mi!"

Tiam iuj lokoj suferis de plago, Taizong ordonis disdoni grenon al la popolanoj. En iuj gubernioj la oficistoj eĉ portis grenon al hejmoj de la plagitaj familioj, kiuj longe post la plago ankoraŭ ne formanĝis la grenon. Cetere li elaçetis per siaj propraj riĉaĵoj gefilojn venditajn de kamparanoj kaj sendis ilin al iliaj gepatroj.

Li praktikis la agraran posed-sistemon disdoni al ĉiu kamparano certan kvanton da agro, por ke ĉiu havu teron por kulturi. Li praktikis ankaŭ novan leĝon pri servuto kaj terimposto, laŭ kiu kamparano povis doni certajn produktaĵojn al la ŝtato por plenumi la servuton, kaj ĉiu kamparana familio devis doni al la ŝtato certan nombron da teksaĵo, kotono kaj lino. Kvankam la novaj leĝoj ne povis liberigi la kamparanojn el feŭda ekspluatado, tamen multe pli malpezigis la ŝarĝon de la kamparanoj kompare kun tiu en Suidinastio. Dank' al tio la kamparanoj povis sin vivteni kaj ankaŭ la socia ekonomio revigli-

ĝis iom post iom. Historiaj literaturoj notis: En 630 p. K., nur 29 personoj estis kondamnitaj al morto en la tuta lando, la socia moro estis bona kaj la popolanoj povis pace vivi eĉ sen fermi sian pordon en nokto.

Taizong fariĝis fiero en siaj lastaj jaroj kaj ne volis aŭskulti ĝustajn konsilojn kaj admonojn de korteganoj. Li multe konstruigis palacojn kaj ŝatis vivi diboĉe. Li dufoje agredis Koreion kaj revenis sensukcese. Tio portis al la popolo grandan suferon kaj multe konsumis riĉaĵojn. Sur la revena vojo li pentis, dirante: "Se Wei Zheng ankoraŭ vivus, li certe deadmonus min de la militiro!"

En 649 p. K. imperiestro Taizong mortis de malsano en sia aĝo de 53 jaroj kaj estis entombigita apud la nuna gubernio Liqian de Shaanxi-provinco.

Liaj politikaj sukcesoj multe superis liajn erarajn farojn, tial li estis eminenta politikisto en la ĉina historio.

PRINCINO WENCHENG EDZINIĜIS AL TIBETA REĜO

Dum la regado de imperiestro Taizong, la lando estis potenca, la nordokcidentaj kaj sudokcidentaj nacimalplimulto respektive nomis lin "Ĉiela Ĥano". Tiam ekprosperis tibeta sklavo-posedsistema regpotenco sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo, la tibeta reganto Sunzamkampo unuigis tibetajn tribojn kaj sendis personojn al Chang'an (la ĉefurbo de Tang-dinastio) por lerni hanciecan kulturon. En 640 p. K. li sendis sian subulon Ludongzam al Chang'an por peti geedziĝan alianciĝon. Taizong promesis edzinigi al Sunzamkampo principon Wencheng.

En la historiaj verkoj oni legas, ke Ludongzam estis saĝa sendito. Taizong ekzamenis lin per kvin malfacilaj demandoj antaŭ ol doni la promeson. La unua demando postulis, ke li trapasigu silkan fadenon tra 9-kurbiĝanta trueton en perlo. Ludongzam ligis per la fadeno la talion de formiko, kiu trairis la trueton kun la fadeno. La demando estis solvita.

La dua demando postulis, ke li distingu el mikse metitaj cent ĉevalinoj kaj cent ĉevalidoj kiu estas kies patrino. Ludongzam apartigis la ĉevalinojn disde la ĉevalidoj kaj ĉesigis doni akvon kaj furaĝon al la ĉevalidoj. Post unu tago kiam li lasis ilin kuniĝi, la malsategaj ĉevalidoj tuj kuris al sia patrino por suĉi lakton. Tiel li glate solvis la duan demandon.

Ludongzam sukcese solvis la aliajn tri demandojn, Taizong tre ĝojis pro lia saĝeco, li promesis ne nur edzinigi al Sunzamkampo principon Wencheng, sed ankaŭ edzinigi al Ludongzam alian filinon de la imperiestra familio.

La princino Wencheng veturis al Tibeto kunportante multajn dotojn, kiuj mankis al Tibeto, inkluzive grenajn, fruktajn kaj legomajn semojn, drogojn, bombiksan ovaron kaj grandan kvanton da libroj pri medicino, farmakologio, agronomio, inĝenierado, astronomio, kalendaro, registaraj regularoj kaj aliaj. Ŝi faris grandajn kontribuojn al la amika rilato inter la hana kaj tibeta popoloj kaj la disvolvo de tibetaj ekonomio kaj kulturo. Forpasis mil jaroj, sed hodiaŭ inter la tibeta popolo ankoraŭ cirkulas multaj popolkantoj kaj rakontoj pri ŝiaj historiaj meritoj.

Bulgara profesoro Gan Yangdao refoje en Ĉinio



Profesoro Gan Yangdao kaj lia edzino Zhang Sunfen en kunsido aranĝita de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj

EN frua somero iu altstatura grizhara maljunulo varme nin akceptis en kvieta kaj eleganta korto de Pekino. Li estas malnova amiko de la ĉina popolo Gan Yangdao, profesoro de la Bulgara Medicina Instituto.

En la plej malfacilaj jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio (1937-1945), kiel membro de la internacia kuractaĉmento, Gan Yangdao venis al la malproksima lando Ĉinio por plenumi kuracan servon kaj batalis ses jarojn ŝultron ĉe ŝultro kun la ĉina popolo. Kaj nun li refoje vizitas Ĉinion kune kun sia edzino.

Profesoro Gan Yangdao aĝas

jam 73 jarojn. Tamen kun ruĝa vizaĝo kaj vigla animo li aspektas multe pli juna ol li fakte estas. Li manpremis nin kaj salutis nin kiel malnovajn amikojn, kvankam ni neniam vidis nin antaŭe. La profesoro vigle konversaciis kun ni. Lia edzino Zhang Sunfen servis kiel interpretino kaj diris al ni, ke li nomiĝas Janto Kaneti. Veninte al Ĉinio, li sin nomis ĉine Gan Yangdao.

En 1939, kiam la rezistmilito kontraŭ la japana agreso ardis tra Ĉinio, Gan Yangdao, kiu ĵus revenis de la hispana kontraŭfaŝisma milito, kiel volontulo aliĝis al la kuractaĉmento organizita de la Internacia Medicina

kaj Medikamenta Asocio por Helpi Ĉinion. La taĉmento alportis al Ĉinio du kamionojn da medikamentoj. Ĝi konsistis el 17 eksterlandaj kuracistoj kaj Gan Yangdao estis unu el ĝiaj respondeculoj. En la 13-a de septembro de tiu jaro la taĉmento atingis Hongkong. Tie ilin akceptis sendito de Song Qingling*. Kelkajn tagojn poste, ŝi mem akceptis ĉiujn membrojn de la taĉmento. Veninte al Ĉinio, la taĉmentanoj prezentis urĝan peton iri al la fronto kaj labori en loko plej proksima al vunditoj. Tiel ĉiu el ili gvidis grupeton el du ĉinaj flegistoj kaj kelkaj aliaj medicinaj laborantoj por iri al kontraŭjapanaj batalkampoj en la provincoj Hunan, Yunnan k. a. en suda Ĉinio. Ĝuste en tiu tempo Gan Yangdao konatiĝis kun ĉina junulino Zhang Sunfen kaj poste ili geedziĝis.

En tiuj jaroj la taĉmento laboris en tre malfacilaj kondiĉoj. Vojoj estis detruitaj, ili do devis iri piede kaj vektportu medicinajn aparatojn. Ili starigis ambulancojn en kabanoj kaj faris malsanulajn litojn kaj brankardojn el bambuo. La taĉmento kuracis ne nur vunditojn de la kontraŭjapanaj trupoj, sed ankaŭ malsanulojn inter lokaj loĝantoj.

Dum la restado en Ĉinio la taĉmento havis konstantan kontakton kun la Oficejo de la Okavoja Armeo en la urbo Chong-

qing kaj ĝiaj membroj alterne veturis al la urbo. Ĉiufoje ili donacis monon al la Komunista Partio de Ĉinio.

Komence de 1942 Gan Yangdao intervidiĝis kun Zhou Enlai**. La lasta sincere diris al la membroj de la taĉmento, ke ili helpis la ĉinan popolon laborante en la kontraŭjapanaj trupoj de Ĉinio. La intervidiĝo neforgeseble impresis Gan Yangdao. Li diris, ke Zhou Enlai estas eminenta persono ne nur en Ĉinio sed ankaŭ en la mondo. Li bone konis aferojn de la mondo. La membroj de la taĉmento alte respektis lin kaj plene kredis liajn vortojn.

Pasis 40 jaroj, de post kiam profesoro Gan Yangdao forlasis Ĉinion. 40 jaroj ne estas mallonga tempo por homa vivo. Tamen li, kun iom da emocio, parolis pri pasintajoj tiel klare, vivece kaj konkrete, kvazaŭ ili estus ĵus okazintaj.

Li venis denove al Ĉinio por viziti longe neviditajn kunbatalantojn. Li diris, ke la unua impresado estas ke "eĝe ŝanĝiĝis Ĉinio". Ruĝvangaj geknaboj tiel viglas kaj amindas. Tamen en tiuj militaj jaroj li vidis ĉinajn infanojn nudaj, skeletaj, tre kompatindaj. Hodiaŭ en Ĉinio la merkato abundas je varoj, ĉie regas prospero. Li atingis Pekinon en la fino de aprilo. Dum sia unumonata restado en Ĉinio li rigardis en la antikva urbo Xi'an la argilajn militistojn kaj ĉevalojn ĉe la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio antaŭ pli ol 2 000 jaroj kaj vizitis la sanktan revolucionan urbon Yan'an kun kaverndomoj loĝitaj de ĉinaj revoluciaj antaŭuloj. Li diris kortuŝite, ke tie oni povas vidi, kiel la ĉinaj gvidantoj gvidis

sian popolon en la batalado en la plej malfacilaj jaroj de la revolucio. Tiam la vivkondiĉoj de la gvidantoj ne niom diferencis de tiuj de la ordinaraĵoj. Li vizitis ankaŭ la urbojn Kantono, Kunming kaj Guiyang, kie li laboris kaj vivis siatempe. Li diris, ke tiuj urboj multe ŝanĝiĝis — la stratoj fariĝis larĝaj kaj altaj domoj anstataŭis malnovajn domojn. Kun granda miro li vidis la grandiozan akvobaraĵon Gezhouba sur Jangzi-rivero kaj vizitis grandan modernan feraŝtalan entreprenon en la urbo Wuhan. Li diris, ke tiajn konstruaĵojn antaŭe oni neniam vidis en Ĉinio. Li veturis speciale al Tuyunguan proksime de la urbo Guiyang por serĉi la lokon, kie funkciis la ambulanco. Tie li vidis la konatajn montojn, tamen la zigzagaj vojetoj fariĝis jam ebenaj ŝoseoj, aperis arbara parko, fabriksdomoj, funtuboj kaj tiel plu. Troviĝis nenia signo de la malnovaj kabanoj de la ambulanco. La urbo Chongqing transformiĝis ĝis nerekonobleco. Li laŭdis ĝin pro ĝia bela pejzaĝo. Por li aparte ĝojiga estas tio, ke li refoje

vizitis la lokon, kie Zhou Enlai lin akceptis tiutempe en la Oficejo de la Oka-voja Armeo. Li diris: "Reaperas antaŭ miaj okuloj la sceno de intima konversacio inter Zhou Enlai kaj ni. La tempo pasis tre rapide! Mi ĝojas pro la sukcesoj akiritaj de la nova Ĉinio. Mi volonte faros novan kontribuon al la amikeco inter la popoloj de Bulgario kaj Ĉinio . . ."

**Song Qingling (edzino de s-ro Sun Jatsen), la honora prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko, forpasis en 1981. En la tempo de la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio ŝi iniciatis kaj gvidis la Ligon por Defendi Ĉinion sinsekve en Hongkong kaj Chongqing. La ligo varbis ĉinojn kaj eksterlandanojn, mobilizis la internacian publikan opinionon kaj klopodis por gajni internacian helpon al la rezistmilito.*

***Zhou Enlai, la ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko, forpasis en 1976. En la tempo de la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio li laboris kiel vicprezidanto de la Revolucia Milita Komisiono de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj loĝis en Chongqing dum sufiĉe longa tempo.*

Profesoro Gan Yangdao kaj lia edzino vizitas la muzeon Hongyan en Chongqing.



KURAGIGANTA EKZEMPLO

Reference al la artikolo aperinta en la marta revuo "Esperanto" n-ro 927 kaj titolita: "Instruado-Esperanto en ĉinaj altlernejoj", mi persone, cetere same kiel multaj esperantistoj, tre ĝojas pri la decidoj de la Eduka Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko, por oficialigi la eblecon instrui Esperanton kiel unu el la nedevigaj fremdaj lingvoj en la altlernejoj.

Tiu rimedo estas kuraĝiganta ekzemplo por la aliaj nacioj, kaj alportos utilegan helpon favore al la disvastigo de la internacia lingvo en la mondo.

Tre gravas, ke la jam diplomitaj, kaj la tuj diplomotaj studentoj rapide starigu kaj siavice gvidu novajn Esperanto-kursojn, cele al kvalita kaj efika antaŭeniro de la

instruado. Ĉar la efikeca plivastigo povas nur naskiĝi el kaj pere de la instruadularo.

Estus same ege dezirinde, ke en la kontaktoj kun fremdaj landoj la ĉinaj altaj instancoj konkretigu siajn faritajn decidojn enkondukante almenaŭ progresan praktikan uzon de la lingvo, precipe en skribaj kaj dokumentoj oficialaj tuŝante la komercajn, turismajn, kulturajn, reklamajn, artajn kaj sportajn sferojn.

Tiu agadmaniero de granda lando, mondscale, nuligus la konvinkomankon de la okcidentaj landoj, kaj ekfunkciigus konsciakiron koncerne la valoron de la lingvo. Ĝi preskaŭ dezirus tiujn landojn adapti la saman vojon kiel Ĉinio pli kaj pli ĉeestanta la mondan scenon.

Se Ĉinio iniciatus enkonduki la lingvon en la internaciajn rilatojn, la influo estus grandega ĉe la publika pensmaniero de aliaj popoloj.

Ŝajnas ke via vasta lando devus estigi la unuan veran impulson, jetante la pilkon — Esperanton sur la ludkampon. Aliaj landoj, ĉiam hezitemaj, sendube rigardos tiun

eston kiel valoran motivon por same partopreni la antaŭenmovadon.

S-ro LEPAGE GEORGES, (Belgio)

TIAJ KULTURAJ INTERRILATOJ HELPOS AL INTER-KOMPREENIĜO

La sensacio inter iranaj e-istoj, kaŭzita de la novaĵo pri oficialiĝo de Esp. en Ĉinio, ankoraŭ disvolviĝas. Lasttempe raporto de tiu novaĵo aperis en irana revuo, nome "Ĝavanan" (Junularo) n-ro 840 P. 40. Pere de tiu ĉi revuo, jam multaj el iranaj gejunuloj konatiĝis kun Esp. kaj instruiĝis dum unu kaj duona jaro (vidu "Esperanto" 12/81). La interesa artikolo en ĉi revuo pri la granda sukceso de Esp. en Ĉinio.

Ĉi-rilate kelkaj punktoj estas atentindaj:

1) La artikolo aperis sub la titolo: "Esp. oficiale akceptiĝis kiel dua lingvo en Ĉinio". La teksto estas konciza traduko de la artikolo aperigita en Monato (n-ro 2/83). En persa teksto, krom aludo al


Forgesemulo




Antaŭ longe estis forgesemulo. Lia edzino proponis, ke li vizitu doktoron por kuracian amnezion.



Li ekrajdis kun arko kaj sago.



Survoje li ligis la ĉevalon al arbo, stariĝis la sagon sur la tero kaj iris al necesejo.



Reveninte el la necesejo, li vidis la sagon kaj mire diris: "Danĝere! Se ĝi flugus pli alten, ĝi certe trafus mian kapon."

“Monato”, ja ankaŭ aludiĝis la gazeto “Lumo” kiel la originalo de tiu novaĵo.

2) La bildoj ĉiuj apartenas al la revuo EPC (n-ro 1/83).

3) Je paĝ-aranĝa aspekto ĉi artikolo aperis en atentokapta kaj konvena loko. Tiu paĝo situas sur la dekstra parto de la revuo, kaj la kontraŭan paĝon komplete okupas bela flor-pejzaĝo. Tiele, kiam oni foliumis la revuon, tiu ilustrita raporto absorbas la atenton.

Efektive, pere de tiu raporto, disprezentigas la belega revuo EPC, ne nur inter iranaj e-istoj, sed ankaŭ pli vaste inter ne e-istaj legantoj de “Ĝavano”.

Kredeble tiaj kulturaj interrilatoj helpas al nia plivasta interkompreniĝo. Preskaŭ estas unuafoje, ke nia popolo konatiĝas kun tia aspekto de Ĉinio. Kaj estas Esperanto, kiu ebligas tiun ĉi belan kaj humanan interrilaton. Estu ke en la jaro komunika ni havu pli fruktodonajn kontaktojn kaj interkontribuojn per la beno de Esperanto.

F-ino **Giti Ahmad-nia** (Irano)



Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- * Mi deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn, donacojn kaj informojn pri landoj inkluzive kuir-arto. S-ino Maria Itacira, R. Catende, 110, Apt 101, Janga, Paulista-53400 (PE), Brazilo.
- * 15-j. lernanto deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj, speciale pri ĥemio. Slawomir Lis, ul. W. Swietych 39, 32-650 Kety, woj. Bielskie, Pollando.

* 18-j. studento John Ikonomu, dez. kor. kun samaĝaj junuloj el Ĉinio, Eŭropo, Ameriko pri teatro, muziko, kino, vojaĝoj k.s. esperante, angle, germane. Skribu al: P.O. Box 1178 K.T., Saloniko, Greklando.

* S-ino Cobi Vooren-Koogje (45-j.), 't Wuiver 8, 1608ES Wijdenes, Nederlando, volas korespondi kun amik(in)oj de ĉiuj landoj. Mi kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn, pupojn en naciaj kostumoj kaj memorajojn.

* 46-jara komercisto-interpretisto deziras korespondi kun liberaj sinjorinoj 35-45-jaraj pri diversaj temoj. Dragan Novakovic, P.O. Box 334 Delson, Que. JOL IGO, Kanado.

* S-ro Boguŝo Samborek, (58-j. pensiulo) 10, rue Sanit-Saëns, 62590-Oignies, France, deziras korespondi kun ĉinaj geesperantistoj.

* F-ino Mojgan-Makhsousi, 14,75 —Tabesh. Tajrish, Tehran 19899, Iran, dez. kor. pri ĉ.t.



Vidinte la ĉevalon sub la arbo, li murmuris: “Kvankam mi teruriĝis, tamen senpage akiris la ĉevalon.”



Li surĉevaliĝis, sed ne sciis kien sin direkti. Tiam la ĉevalo portis lin reterne al lia hejmo.



Longe rondrajdante antaŭ sia domo, la forgesemulo dube demandis: “Kies domo ĝi estas?”



Aŭdinte lian voĉon, lia edzino eliris kaj kolere insultis lin. Surprizite li diris: “Fratino, kiu vi estas? Kial vi insultas min?”

Vojaĝo laŭ la Dua Songhua-rivero

de LI PING

La 2 317-kilometra Songhua-rivero estas la tria granda rivero en Ĉinio. Ĝi formiĝas el la Dua Songhua-rivero, kiu fontas el la montaro Changbai, kaj la rivero Nenjiang fontanta el la monto Yilehuli de la montaro la Granda Xing'anling. La rivero Songhua trafluas la provincojn Jilin kaj Heilongjiang, kaj ĝia baseno kovras 546 000 kvadratajn kilometrojn, nur iom malplimulte ol Jangzi-rivero kaj la Flava Rivero.

La baseno de Songhua estas unu el la luliloj de la ĉina kulturo. Ĝi estis vasta kampo, kie prezentis sian heroecon multaj naciecoj de nia lando. La fekunda tero ambaŭborde de la rivero kovrata de densaj arbaroj, gravedas je abundaj produktajoj kaj grandkvantaj mineraloj. La krudtrajta sed mirindaj naturaj pejzaĝoj de la rivero altiras al si en- kaj eksterlandajn turistojn.

Ĉi-somere la aŭtoro vojaĝis laŭ la rivero komence de Changbai-montaro, unu el la riverfontoj, ĝis la kunfluejo de la riveroj Songhua kaj Heilong. Niaj legantoj legos lian raporton en tri sinsekvaj numeroj de nia revuo.

LA RED.

Kuŝante en ĉambro de la 12-a etaĝo de la Hotelo Changbaishan en Changchun, la ĉefurbo de Jilin-provinco, mi neniel povis al mi imagi, kiel aspektas la Ĉiela Lago, malgraŭ ke pendas en la manĝejo de la hotelo giganta olepentraĵo pri tiu lago kaj nemalmultaj amikoj jam detale priskribis ĝin al mi. Mi ekhavis klaran ideon pri ĝi nur en la sekvanta tago, kiam mi grimpis sur ĝin. Longa vivado en granda urbo limigis mian imagpovon.

Subtila pluvo falis kvazaŭ kribrita. Antaŭ mi etendiĝis senlima akvo. Malklare vidiĝas dek ses montpintoj nubokovritaj. Ni ĉiuj silentiĝis, kvazaŭ timigitaj antaŭ la majesteco de la naturo kun lago, formita de kratero plena de akvo. Ardis en mi ekscitiĝo kaj mi pretervole

genuiĝis ĉe la lagobordo kaj kun plezuro ektrinkis la puran akvon.

La lago estas unu el la fontoj de Songhua-rivero, kies nomo en la manĉura lingvo signifas "riveron el la ĉielo". La lago kovras ĉ. dek kvadratajn kilometrojn. Ĝi meznombre profundas je 204 metroj kaj la pleja profundeco estas 373 metroj. La montpinto Baiyun alta je 2691 metroj super la marnivelo nordokcidente de la lago, estas la plej alta pinto en la Nordoriento de Ĉinio. Norde de la lago estas breĉo, tra kiu abrupte torentas malsupren ĝia akvo formante falakvon 68 metrojn altan. Ĉirkaŭ la falakvo kondukas vojstreko al la lago. Tie akvo disŝprucanta nebule kovras ĉion kaj surdige tondras.

Ni nin banis en termofonto

proksime de la akvofalo kaj poste venis al la hotelo situanta en betularo.

Falis vespera krepusko. Mi iris al balkono kaj de tie rigardis malproksimen al la vastega maro da arboj. Mia akompananto, Jin Renzhi, estro de la turisma buroo de la gubernio Antu, diris al mi ke tie tre abundas naturaj riĉfontoj, kaj la montaro Changbai estas unu el la plej grandaj konservejoj de Ĉinio. Ĝi vekis fortan intereson de la eksterlandaj fakuloj kaj turistoj. La ĉi-tiea turisma afero havas brilan perspektivon.

Frumatene de la sekva tago mi ĵipe forveturis de la montaro. Subite bremsis la ŝoforo: kapreolo scivoleme rigardis nin malproksime sur la ŝoseo. La besto kun neniom da timo ĝentile ba-


lancis sian kapon kaj poste facilmove iris en la arbaron.

En la supra baseno de la Dua Songhua-rivero konserviĝas multe da oro, arĝento, kupro, fero kaj karbo. La orminejo Jiapigou, fondita en 1821, ĝuas altan reputacion pro la bonkvalito de sia oro.

Tamen la plej valora estas ĝia akvoenergio. Tie la rivero ofte kuras sur kruta deklivo kaj la akvo torentas furioze, kio liveras bonajn kondiĉojn por produkti elektron. La ŝtato decidis konstrui tie kelke da grandaj kaj mezgrandaj hidroelektrejoj ŝtupare vicigitaj, inter kiuj la plej granda estas la Hidroelektrejo Baishan. Ĝi konsistas el kvin generatoroj de kapacito de 300 000 kilvattoj. Ĉe la fino de la kuranta jaro 2 el ili komencos produkti elektron. En 1985, plene kompletigita, ĝi fariĝos la dua granda hidroelektrejo en Ĉinio, nur malpli granda ol la Hidroelektrejo Gezhouba.

Starante sur altejo, mi rigardis foren: arbaroj regis la valon. Oni diris, ke antaŭe tie ne estis fervojo, nek ŝoseo, kaj eĉ tre rare videblis homspuroj. Antaŭ multaj jaroj, por trovi konvenan lokon de riverbaraĵo la prospektoroj longe serĉadis piedirante en la densaj praaĵ arbaroj, aŭ grimpante sur abruptajn krutaĵojn, iuj el ili eĉ oferis sian vivon. Tiam la baraĵo por ili aperis nur en sonĝo, sed tiu tamen realiĝis dank' al ilia penado. Hodiaŭ antaŭ ni staras baraĵo 670 metrojn longa kaj 149.5 metrojn alta, ĉe kies supra baseno jam formiĝis bela artefarita lago.

Ĉe la konstruejo ĉie regis vikleco. Sur la montoj ĉe ambaŭ ekstremoj de la baraĵo staras du altaj vinĉoturoj. Streĉe laboras



Traktejo de uzita akvo de la Jilin-a Kemiindustria Kompanio

kabloj pezaj po 20 tunoj. Jen kamiono estis levita, brilanta en la suno. Ĝi tre similas al infana ludilo, rigardate de malproksime. Preterpasante la turon, mi aŭdis komandadon de knabino el radioparolilo. Mi informiĝis de mia akompananto, ke antaŭ kelke da tagoj eniris en la manipulejon de la maŝino verkisto, kiu demandis la junan manipulantanton: “Ĉu permesite por vi babilu kun la knabino?” “Ne,” respondis la junulo. “Sed se vi havus ion por informi ŝin, ekz. ke vi volus sciigi ŝin, ke vi havas du filmbiletojn kaj volus inviti ŝin rigardi filmon kune kun vi post laborhoroj aŭ peti ŝin varmigi por vi manĝaĵon? Tiaokaze ĉu vi povus paroli kun ŝi?” En la okuloj de verkistoj ĉio prezentas poezion.

Mi vidis inĝenieron Shi Zhenhuan en iu mallukse meblita kabineto. Li estis diplomita el Qinghua-universitato en 1967. Li, pli-ol-40-jara, aspektas maljuneta, parolas malfacile pro manko de pluraj dentoj.

Jen kortuŝa historio pri liaj dentoj: Kluzporda puto estas malfacile konstruebla, tamen ŝlosila parto de la tuta konstruo. Apliko de la tradicia metodo prokrastus plenumon de plano je ĉ. unu jaro, dum apliko de

avangarda metodo entenas kelkajn demandojn nesolvitajn eĉ internacie. Shi, kiu gvidis la arkitekturan projekton, klare konsciis pri la graveco de sia devo. En tiuj tagoj li suferis de akra dentodoloro. Ĝuste tiam li devis oficvojaĝi al Pekino por konsulti koncernajn materialojn. Antaŭ la forveturo liaj edzino kaj superulo instigis lin viziti dentiston pro la malsano. Sed, atinginte Pekinon, li tuj dronis en la maro de materialoj, tute neglektante sian malsanon. Finkonstruiĝis la tri kluzpordaj putoj, sed liaj dentoj falis unu post alia. Por rekompenci lian sindonemon en la konstruo de la hidroelektrejo la provinca registaro premiis lin kiel superan kontribuanton.

“Tio estas mia devo,” li diris al mi. “Mi deziras nur ke la akvoenergio de la Dua Songhua-rivero estu pli frue utiligata kaj ne perdita.”

Forlasinte la hidroelektrejon, mi daŭrigis mian vojaĝon laŭ la rivero kaj atingis vilaĝon Huashulinzi ĉe la bordo de la lago Songhua. Tie mi tranoktis kaj ĉe la mateniĝo de la sekva tago veturis vaporboate al Fengman, la alia ekstremo de la lago.

La lago Songhua estas artefarita, formita de blokado de la

barajo. La lago estas longa pli ol cent kilometrojn kaj larĝa dek kilometrojn. Survoje kapricis la vetero, senĉese ŝanĝis siajn formojn la nuboj kovrantaj verdajn montojn, sur kiu serpentumis la vojo. Vere admirinda pejzaĝo!

Ĉefŝipisto Xiao Wang, 23-jara, estas tre sperta en navigado. Li amas literaturon kaj havas multajn literaturajn eldonaĵojn en sia kajuto. Kvankam silentema, li profunde impresis min.

Post 9-hora navigado, ni atingis Fengman, kiu situas je 20 kilometroj for de la urbo Jilin.

La S-forma rivero Songhua ĉirkaŭas la urbopartojn de Jilin. Laŭ historiaj notoj la urbo aperis en 1673. Pro facila trafiko akva kaj tera, ĝi estis grava strategia loko jam antaŭ sia urbiĝo.

La hotelo Dongguan, kie mi pasloĝis, situas tuj ĉe la bordo de la rivero. De la pordo de la hotelo oni povas vidi ŝosean ponton super la rivero. Vespere, oni promenas du- aŭ triope laŭ la bordo. Kelkaj knabegoj ludas gitaron rigardante la trembrilan akvon. Ili kantas pri amo, pri la patrujo kaj pri la bela estonto.

Ĉi tie plej allogas vintro. Ĉe vesperiĝo, vagadas densaj nebuloj super la rivero kaj formiĝas belaj pendajoj kristale brilaj sur la arboj ambaŭbordo de la rivero. Fremdlandaj turistoj speciale veturas ĉi tien por ĝui la belan pejzaĝon. La ŝtato decidis konstrui la urbon en centron de skiado. Ĉe la okcidenta bordo jam finkonstruiĝis skiejo kun alteco de pli ol 900 metroj, al kiu transportas la skiistojn telfero tra distanco 1 800 metrojn longa. Oni povas okazigi tie landskalan kaj internacian skian konkurson.

Jilin estas ankaŭ grava industria urbo. En la Dua Songhua-

rivero abundas bonkvalita akvo, kiu taŭgas al la kemia industrio. Tial en la Unua Kvinjara Plano (1953-1957) Ĉinio starigis tie la unuan en la lando grandan kemiindustrian bazon, Kemiindustrian Kompanion de Jilin.

Kun disvolviĝo de produktado ĉiam pli serioziĝas polucio. La kemiindustria kompanio farigis la plej granda fonto de malpurigo ĉe la rivero Songhua. La problemo vekis atenton de koncerna instanco nur en la sepdekaj jaroj. La kompanio komencis konstrui grandan traktejon de malpura akvo ekde majo 1979. Ĝi ekfunkciis oktobre de 1980 kaj povas purigi 8 000 tunojn da uzita akvo ĉiuhore. La traktita akvo atingis la ŝtatan normon.

Akompanate de diketa kaj energia inĝeniero Pan, mi vizitis la traktejon. Li paciencie konigis al mi, laiko tiuflanka, pri


la procedo de la traktado. Li partoprenis en la projektado kaj konstruado de la traktejo, kie ĉie sentebblas liaj zorgemaj manoj. Li venis tien labori jam pli ol 20 jarojn tuj post sia diplomitiĝo de supera lernejo en Ŝanhajo. Nun tiu 45-jara inĝeniero laboras en la mediprotekta kabineto sub la kompanio.


La traktejo situas tuj apud la rivero. En la fabriko ĉie prosperas arboj, parfumaj floroj kaj verdas gazonoj. Promeni tie estas refreŝige kaj plezurige.

La Dua Songhua-rivero ĉirkaŭiras la urbon kaj daŭrigas sian kuradon norden kaj renkontiĝas kun la rivero Nenjiang, milda kiel juna knabino, en Fuyu-gubernio kaj formis torentan riveron Songhua, kiu turnas sin orienten.

(Daŭrigota)

1. River-fonto
2. Songhua-lago
3. Jilin
4. Changchun
5. Harbin
6. Qiqihar





De la fonto ĝis Songnen-ebenaĵo

Kaskado ĉe la riverfonto

Foto de LANG QI




Pejzaĝo de la supra parto de Songhua-rivero

Foto de LI YUMIN

Vintro êe Songhua-lago


Foto de LANG QI






Vilaĝo apud la rivero

Foto de YANG WEIQIANG




Vagonaro transportanta lignon de Changbai-montaro

Foto de LANG QI



Koreoj falĉas rizon ĉe la rivero.


La hidroelektrejo Baishan en konstruado



ANTIĜVAJ FREŝKOJ DE YUNNAN

“Amuzado sub arbo”, pentrita la 17-an jarcenton, estas konservata en Wenchang-palaco en la Weishan-a Ji- kaj Huj-nacieca Aŭtonoma Gubernio. Ĝi vivece prezentas la vivon de tiamaj ji-oj.





“Vilaĝo” pentrita sur roko

“Danco omaĝe al la Budho”



Parto de la “Grandaj Ĉielaj Dioj”, fresko de Lijiang, prezentas historion en budhisma sutro. Ĝi karakteriziĝas per delikata kaj serioza stilo de pentrado kaj infere animskua etoso.



